L. T. 1911 N:o 10 P. 442
Rec. por Aline.

Donaco
de
Unua Esperanto Unuigo en Wien.

ALINE

700561-17

Presejo : Alb. Kündig, Ĝenevo.

C.-F. RAMUZ

157

ALINE

RAKONTO

Tradukita de René de Saussure.

ĜENEVO
Librejo Kündig, Corraterie, 11.
—
1911

Esperanto Verein
Wien

Al Sino Prof. M. Hankel.

(La Tradukinto)

UNUA PARTO

I

Julien Damon revenis hejmen el falĉado. Estis varmega. La ĉielo ŝajnis kiel kolorita lado, la aero ne moviĝis. Unu flanke de la alia oni vidis la blankiĝantajn kvadratojn de aveno kaj la blondajn kvadratojn de tritiko; pli fore, frukt-ĝardenoj ĉirkaŭis la vilaĝon kun ruĝaj kaj brunaj tegmentoj; kaj ankaŭ burdoj preterflugis.

Estis tagmezo : la horo kiam la ranetoj en herbaj kavaĵoj suferas pro la suno, kiu sorbis la roson, kaj ilia glata gorĝo saltetas rapide. Sur la deklivoj oni flaras odoron de brulinta korno.

Kiam Julien pasis apud arbetaĵoj, paseroj ek-flugis el interne, ĉiuj kune, kvazaŭ ŝtono eksplodus. Li marŝis kviete, pro la varmo kaj ankaŭ pro tio, ke rapidi ne estis lia kutimo. Li fumis cigarpecon kaj lasis sian kapon kliniĝi inter siaj kvadrataj

ŝultroj. Iafoje li haltis sub arbo; tiam ombro eniris tra lia malfermita ĉemizo; kaj relevinte sian ĉapelon, li viŝadis al si la frunton per sia maniko; kaj kiam li eliris denove ĉe la suno, lia falĉilo subite ekbrilis kiel flamo. Li reprenis sian egalan paŝon. Li ne ĉirkaŭrigardis, ĉar li jam konis ĉiun aĵon, eĉ la ŝtonojn de la strato, en tiu kamparo kie nenio ŝanĝiĝas krom la sezonoj, kiuj estas montritaj per maturiĝo de la fojno aŭ falo de la folioj. Kaj li sonĝis nur pri tio, ke la manĝo devas esti preta kaj li malsatas.

Sed, atinginte la straton, li subite haltis, almetante manon super la okuloj. Virino estis venanta. Ŝi ŝajnis havi jupon faritan el rozkolora polvo. Li diris al si : « Ĉu estas Aline? ..... » Kaj kiam ŝi alvenis pli proksime, li vidis ke efektive estas ŝi. Tiam li sentis bateton ĉe la koro. Ŝi marŝis rapide, baldaŭ ili kuniĝis.

Ŝi estis maldika kaj iom pala, estante dekseptjara, aĝo en kiu koloroj foriĝas, kaj ŝi havis lentugojn sur la nazo. Tamen ŝi estis beleta. Ŝi havis okulojn nedeciditajn, kiel la tagiĝo. Ŝia granda ĉapelo ĵetis ombron sur la vizaĝon ĝis la buŝo, kiun ŝi tenis fermita. Ŝiaj blondaj haroj, zorge glatigitaj sur la frunto, estis ligitaj dorse en

pezaj plektaĵoj. Ŝi portis korbon sub la brako kaj ŝiaj kamparaj ŝuoj elstaris de sub ŝia mallonga jupo.

Julien diris :

— Bonan tagon.

Ŝi respondis :

— Bonan tagon.

Tiamaniere ili komencis. Kaj li denove parolis :

— De kie vi venas?

— De ĉe mia onklino.

— Estas varmege.

— Ho! jes.

— Kaj estas tre malproksime.

— Tri kvaronoj de horo.

— Ja, diris li, estas lacige kun tia suno kaj polvo.

— Nu, mi estas alkutiminta.

Ili staris kvazaŭ gekonatoj, kiuj renkontinte unu la alian, belmaniere interparoletas. Julien havis unu manon en la poŝo, la alian sur la tenilo de sia falĉilo, kaj parolante li deturnis la kapon.

Tamen oreloj de Aline ruĝiĝis. Kaj li ankaŭ, malgraŭ sia ŝajno, intencis diri ion, kio estas nefacile direbla. Li reparolis :

— Kien vi iras?

Ŝi diris :

— Mi? mi iras hejmen.

— Ankaŭ mi.

Dum ili ambaŭ marŝis unu apud la alia, Julien klopodis en sia kapo. Ekzistas okazoj, ĉe kiuj la penstuboj estas kvazaŭ ŝtopitaj. Tiam li rigardis supren. En la branĉoj oni povis ekvidi la ĉerizojn, blankaj ĉe l'ombro kaj ruĝaj ĉe l'suno. Abeloj kun bruo de sonoriloj trinkadis ĉiuj kune el la floroj. Baldaŭ montriĝis la vilaĝo. Kaj ĉar tempo urĝis, Julien serĉis en sia kapo pli profunden, kie sin kaŝas la ideoj, kaj diris :

— Mi falĉis dum la tuta mateno; estas nefacile kun tia seko. Estas tagoj en la vivo, en kiuj oni ne kuraĝas vivi.

— Vere, respondis Aline, oni havas plezuron el nenio.

— Kaj plue, diris li, trovinte sian ideon, estas longe de kiam ni ne revidis nin.

Aline mallevis la kapon. Ŝi diris :

— Efektive, ĉar estas epokò, en kiu la ĝardeno postulas. Kaj ankaŭ patrino, kiu estas tute sola.

Sed, ĉar li estis obstina, li balancadis la frunton.

— Aŭskultu, li reparolis, se vi estus ĝentileta, nu! oni sin revidus.

Tiam Aline paliĝis.

— Kion? diris li.

— Mi ne scias, ĉu mi povos.

— Diable! tamen oni bezonas interbabili.

En tiu momento ŝi hezitis kaj ŝia koro tremetis kiel pomo ĉe pinto de branĉo, kaj fine la deziro fariĝis pli forta.

— Se mi tre rapidas, diris ŝi, eble unu fojon.

— Kiam do?

— Kiam vi volos.

— Ĉu konvenas hodiaŭ vespere, apud la Oŭĝes?

— Ho! jes, eble.

Ili estis alvenantaj en la vilaĝo; la domoj staris apud la strato kun ĝardenoj, fontanoj kaj sterkoj. Julien diris ankoraŭ :

— Ĝis vespero, sénmanke.

Kaj ŝi respondis :

— Mi provos laŭeble. Senmanke.

Aline vivis sola kun sia patrino en malgranda domo. Ili posedis ankoraŭ kaprinon kaj bone ludoneblan kampon, kiu alportis al ili okdek spesmilojn jare. Maljuna Henrikino ŝatis la monon, kiu palpe estas dolĉa kiel veluro, kaj ankaŭ odoras. Sed la monon ŝi ŝatis nur, ĉar ŝi tiom laboris por akiri ĝin, ke al ŝi restas tordita kolo, kurbiĝinta

dorso kaj manradikoj kiel du ŝtonetoj. La vejnoj sub la manhaŭto similis inkmakulojn. Ĉar ŝi ne plu havis dentojn, ŝia mentono supreniĝis ĝis la nazo, kiam ŝi mangas. Ŝi trairis la vivon kviete, farinte kion oni devas fari; ŝi vidis, kio estas bona kaj kio estas malbona; fine ŝi atendis morton je ĝia horo, ĉar Dio estas justa. Ŝi havis nigran kufon sur la haroj tiritaj ĉe la tempioj. Tagoj alvenis, tagoj forflugis kaj kreskaĵoj kreskis, ĉiu en sia sezono.

Ŝi diris al Aline :

— Vi forestis longe.

Aline respondis :

— Mi iris tiel rapide, kiel mi povas.

Ŝi pensis pri Julien, kaj pro tio ŝi estis malatenta. Ŝi memoris la unuajn fojojn, kiam ŝi vidis lin; ili konis unu la alian de el la lernejo; nur li estis jam kun la granduloj, kiam ŝi estis ankoraŭ kun la etulinoj. Kaj, ian tagon, ili renkontis unu la alian, Julien akompanis ŝin, poste li revenis; komence ŝi ne atentis; kaj jen, iam post iam, ŝi havis plezuron vidi lin, ĉar neaŭdite la amo eniĝas koron; sed kiam ĝi estas interne, ĝi fermas la pordon.

Malrapide pasis posttagmezo. Varmo pezigas la

korojn, kiel pluvo la birdflugilojn. Aline deŝiris latukojn per malnova rustinta trancĉilo. Kiam oni trancĉas la trunketon, eliras blanka laktaĵo, kiu algluiĝas kaj lasas brunajn makulojn sur la fingroj. La akraj linioj de l'tegmentoj tremetis kontraŭ la unutona ĉielo, oni aŭdis la kokinojn klukantaj, kaj sur la florsuproj abeloj resaltis kvazaŭ pilketoj el rezino. Suno ŝajnis senmova. Ĝi verŝis sian flamon kaj la aero leviĝis ĝis la brancĉoj malaltaj, kie ĝi staris momenton kaj refalis; formikoj kuris sur la ŝtonoj; en la fazeoloj merlo flugetis. Kiam ŝia antaŭtuko estis plena, Aline konsideris la tagon, ĝardenon kaj kamparon. Poste ŝi aŭdis, ke ŝin vokas la patrino.

Fine la suno ŝanceliĝe malsupreniĝis al la monto kaj platiĝis sur ĝin simile al fluidiĝanta bulo el vakso. Ĉaretoj ruladis sur la strato. La horo venis. Ŝi estis dirinta al li : « Senmanke ».

Ŝi forkuris tra la kampoj ĝis apud la Oŭĝes. Ĝi estis loko malseka kun en la mezo rivereto kavigita en la nigra teraĵo; kaj apud ĝi staris arbareto.

Ŝi alvenis unua, sed Julien baldaŭ poste. Por sin beligi, li havis sian dimancan jakon sur sian ĉemizon. Ili sidiĝis ĉe la arbarrando. El suproj de

la aero falis rozkolora polvo; super iliaj kapoj birdoj flugilbatante rapidis al siaj nestoj; malproksime bojis hundo; kelkafoje voĉbruo alvenis ĝis ili.

Julien diris :

— Vi vidas, vi bone agis aŭskultinte mian peton. Kiu vidus nin?

Aline respondis :

— Jes, sed mi estas malproksime, se oni postserĉas min.

— Vi ja rajtas foresti momenton. Oni faras nenion malbonan.

— Ho! ne, diris ŝi.

Subite ŝi sentis tiom da feliĉo en sia koro, ke ĝi ŝajnis tro malgranda. La ombro karesis ŝiajn harojn. Ŝi pensis, ke ŝi faras nenion malbonan. Ŝi estis tien veninta, ĉar Julien estas ŝia bonamiko. Kaj ŝi deziris ne paroli nek moviĝi, por vidi la ĉielon kaj la arbojn kaj ĉion, kio estas dolĉa en la aero; sed jen Julien diris :

— Mi alportis ion por vi.

Li tiris pakaĵeton el sia poŝo kaj reparolis :

— Ĝi estas por vi.

Unue ŝi estis surprizata; poste ŝia feliĉego forflugis; ŝi havis iom da timo; ŝi diris :

— Mi ne kuraĝas.

— Kia malspritaĵo!

Tiam ŝi malfermis la manon; malpeza estis la pakaĵeto kaj ligita per ŝnuro. Ekstere ĝin kovris griza papero; sube, silkpapero fiksita per blua rubando; kaj en la silkpapero estis skatolo el kartono. Sur la kovrilo estis pentritaj sinjoreto kaj sinjorineto sidantaj sub laŭbo. Aline diris :

— Kio estas tio?

— Trarigardu, mi ne volas diri al vi.

Kaj poste, malferminte la skatoleton, ŝi ekvidis en la rozkolora vato du orelringojn el orizita arĝento kun koralbulo. Ŝi diris nenion. Io premis ŝin en la brusto.

Julien demandis :

— Ĉu ĝi plaĉas al vi?

— Ho! tiome.

— Mi aĉetis ĝin en Laŭsanne.

Ŝi reparolis :

— Ho! multan dankon.

Kaj li kun kontenta mieno ŝin rigardis, ĝuante ke li estas sufiĉe riĉa por aĉeti donacojn al sia bonamikino, ne bezonante sin senigi je la kutima cigaro kaj glaso da vino.

— Palpu vi, li diris, ĝi estas peza.

Aline skuetis la kapon.

— Ekzistas tiaj, kiuj estas malplenaj, vi scias; sed ĉi tiu, ĝi estas masiva.

Kaj li aldonis :

— Sed vi ankaŭ devas doni al mi ion.

— Ho! diris ŝi, mi volonte konsentus, sed mi havas nenion.

— Ke jes, ke vi havas ion.

Ŝi malfermegis la okulojn.

— Kion? ŝi diris.

— Ho! li diris, nur kiseton.

Aline ruĝiĝis kaj sin repelis. Julien ripetis :

— Nur kiseton, kiseteton, sur la nazpinto, por ridi.

— Ho! certe ne.

— Ĉu vi eĉ sentos ĝin? Oni ne havas tempon diri « unu », kaj jam estas finite.

— Ho! ne, diris ŝi, mi ne povas.

Ŝi bone sciis, ke malpermesataj estas la kisoj. Tiujn, kiuj permesas ĉirkaŭprenon, la knabinoj montras unu al la alia, kubutpuŝante. Kaj ankaŭ la kateĥismo en la lernejo, kien oni iras dum du jaroj. La pastro legas en libro ; ĉiufoje, oni devas memorripeti la lecionon. Oni lernas, kio estas permesata, kaj kio estas malpermesata. Oni ankaŭ

lernas, ke la malbonuloj estas punotaj kaj la justuloj rekompencotaj. Kaj Aline estis bonintenca por la bono.

Tamen Julien, maltime, metis brakon ĉirkaŭ ŝia talio, kaj ŝin altiris al si. Kaj ŝi defendis sin; sed krepusko incitis, kaj ankaŭ la herbaĵo kun sia roso, kaj la branĉoj, kaj la mallumo, kiu murmuris : « Iru al li ». Ŝveliĝanta estis ŝia koro, kaj peza pro ĉiuj tiuj okazaĵoj ĝi kliniĝis al Julien.

Poste ŝi sentis la buŝon de Julien sur la sia, kaj ŝia korpo fluidiĝis, kiel neĝo sub suno.

Ŝi refirmigis siajn malorditajn harojn. Ĉe la horizonto disiĝis la lasta lumeco de l'ĉielo. Ŝi komprenis, ke estas malfrue, kaj kurante ŝi foriris.

Kiel dezerta estis la kamparo! La frotetado de ŝiaj piedoj en la herbaĵo similis grandan bruon. La unua stelo ekaperis. Ŝi en la koro havis kvazaŭ tintileton, kiu sonis seninterrompe kaj diris : « Julienon mi tre amas..... Julienon mi tre amas ». En sia fermita mano ŝi tenis la skatoleton, kaj ŝi pensis momente : « Min ankaŭ Julien amas. »

Mallongaj estas la someraj noktoj. Je frua tagiĝo la laboristoj foriras por falĉi, dum la herbo estas ankoraŭ moleta. En la domoj oni klopodas, kaj de kokinejo al kokinejo kantas la kokoj. Mal-

juna Henrikino sin levis; ŝi ellitiĝis ĉiam frumatene, ĉar ŝiaj kutimoj estis reguligitaj kiel horloĝa meĥanikaĵo. Tuj kiam ŝi estis vestita, ŝi iris alvoki Alinen.

Per unu salto la suno supreniĝis super la arbaro. Jen venas nova tago de l'vivo. Sur la forno akvo komencis boli. Kiam la kafo estis preta, la virinoj sidiĝis ĉe la tablo. Kaj Aline iom hontis, ĉar ŝi ne plu estis kiel kutime, nun; tamen ŝi manĝis kaj trinkis; kaj eĉ fine diris :

— Patrineto, kiel oni boras al si truojn tra la oreloj?

Henrikino miregis :

— Kial tia demando?

— Ial.

— Ĉu mi scias, mi? Tio taŭgas nur al sinjorinoj.

Aline silentis. Sed kiam ŝi estis sola, ŝi iris al sia spegulo kaj per kudrilo enpikis sian orelon. Ŝi mordis al si la lipojn por ne krii pro troa doloro, kaj sur la haŭto formiĝis sangperleto; tamen la truo ne estis traborita, kaj ŝi vidis, ke la tasko estas tro malfacila. Tiam ŝi kaŝis la skatoleton en fundon de tirkesto, kaj ellitiĝis nokte por ĝin rerigardi.

II

Post la matenmanĝo — la maljunulinoj ŝatas nenion tiel multe kiel kafon, — Henrikino kaj Aline mastrumadis en la du ĉambroj kaj en la kuirejo; poste ili portis manĝon al la kaprino. Ĉar ŝi estis blanka, oni nomis ŝin Blankineto; kiam ŝi manĝis, ŝi movetis la nazaĵon; kaj oni devis ankaŭ ŝin melki, kaj jen baldaŭ venis la horo por tagmanĝo. Tiam, kiam la tago estas forfluinta, tempo flugas rapide; ĝi estas kiel sitelo, kiu pleniĝis malrapide, kaj subite malpleniĝas per renversado. Tiel nur post la vespermanĝo Henrikino havis momenton liberan por eliri kaj fari viziton aŭ aĉeton.

Sed tempon postulis precipe la ĝardeno, ĉar por rikolti belajn legomojn, necesas senĉese sarki kaj akvumi; kaj dum somero oni bezonas multon da akvo, frumatene kaj malfruvespere, ĉar laŭdire

akvumado je suno brulumas la kreskaĵojn. Fine la herbaĉoj kreskas propramove, sed ne la semaĵoj, nek la legomoj, kontraŭe.

Henrikino fierigis pro sia ĝardeno. Ĝi estis la plej bela en la tuta vilaĝo; ĝia teraĵo estis nigra, la kvadratoj estis rektaj, kvazaŭ desegnitaj sur papero, kaj la brasikoj tiel dikaj kiel homkapo. Post la longdaŭra sarkado, ŝi streĉis la dorson kaj ekdiris unue : « Haj », ĉar al ŝi bruldoloris la lumboj, sed ŝi tamen estis kontenta vidante, ke ĉio estas en ordo. Trovigis tie ankaŭ arboj fruktoportantaj kaj maljuna prunarbo sub la fenestroj. Super la preĝejo la suno montrigis rigardante en la ĝardenon per sia ronda okulego, kiu faras la tagon; kaj oni flaris odoron de la tero.

Aline, laborema knabino, helpis tiom, kiom ŝi povis. Ŝi streĉis la lesivŝnuregon; ŝi kalkulis grajnojn en la manplato, ĉar ŝi havis bonajn okulojn; aŭ ŝi ĉerpis akvon kaj, dum ŝi pumpis nudbrake, la puto grincadis kiel blekanta azeno.

Ŝi ankaŭ ofte iris en la vilaĝon. De sur la sojlo de sia pordo ŝiaj amikinoj alvokis ŝin, kaj ili havis kiel ŝi harojn disigitajn kaj manikojn suprentiritajn, ĉar estas la sorto de la filinoj iĝi frue utilaj en la hejmo; ili devas esti kapablaj mastrumi, se ili

volas edziniĝi. Aline ridetis al ĉiuj; feliĉo levetis ŝiajn lipojn kaj malkovris la dentojn. Ĉio ŝajnas facila en tempo de amo. La suno estas pli hela, la floroj estas pli belaj, kaj pli bonaj la homoj. Tiam la mondo ekaperas ornamita kiel festokampo per siaj arboj, kampoj kaj montoj.

Ŝi rigardis sin ree en spegulo. Ŝi diris al si : « Ĉu mi estas beleta? Mi ne estas certa; tamen eble iom ». Kaj ŝi estis vere beliĝinta, ĉar la vangoj estis pli rozkoloraj, pli ruĝaj la lipoj, kaj pli bluaj la okuloj. Okazas tempo tia; juno el-ŝprucas el koro feliĉa, kaj ĝi aperas kiel mateno sur la kamparo.

Ŝi kelkafoje ankaŭ diris al si : « Mi ja bone amas patrineton. Mi ne estas aminda, ke mi kaŝas min de ŝi, sed alie agi oni ne povas ». Kaj ankaŭ tiu penso preterpasis. Pro ŝia amo ŝi kompatis la suferantajn bestojn, la vermojn tratranĉitajn de la plugilo kaj la florojn piedpremitajn. En la vilaĝo vivis knabino, kiun oni veturigis en trirada ĉareto; ŝiaj kruroj sekiĝis kiam ŝi estis infano, kaj ŝi povis nek marŝi, nek stari; pro tio ŝi ne kreskis, ŝi restis infansimila, sed ŝia kapo estis plenkreska. Kaj Aline pensis : « Dio mia! kompatinda knabino! » « Kaj, ŝi pensis, se mi estus kiel ŝi! » Kaj

ŝi ĝojis, ke ŝi estas vigla kaj vivplena, kun sanaj kruroj por iri al siaj rendevuoj.

Julien kutimis veni manojn en la poŝoj. Kiam li alvenis unua, li kaŝis sin. Aline serĉis lin, kaj subite, kiam ŝi estis tute proksime al li, li kriis : « Hu! » en la ombro, kaj vidante, ke ŝi ektimas, li ĝojis, dirante :

— Vi estas timema!

Poste ili sidiĝis. Helikoj eltiris siajn nigrajn kornojn kaj trenis sian konkon, kiu ŝanceliĝis sur la glua dorso; kiam la terajo estis malseka, fungoj elkreskis en unu nokto tra la putriĝaj folioj. La aveloj estis apenaŭ formitaj kaj ankoraŭ molaj en sia verda adstringa haŭto, sed kelkafoje oni trovis forgesitan fragon, falantan en la fingrojn. Jam estis malhele en la arbareto; kvazaŭdometon ili havis por si, kaj oni ne povis vidi ilin, sed ili povis vidi, ĉar troviĝis ronda pordo kaj truoj kiel fenestroj, kaj la ĉielo ŝajnis vitrajo. La folioj degutetis sur ilin, rivereto tintis simile al sonorileto, kaj rapide preterfluis la tempo.

Ŝi diris :

— Mi devas foriri.

Li respondis :

— Vi havas ankoraŭ multe da tempo.

Kaj ŝi restis, sed fine devis foriri.

Dum ili estis kune dimanĉon matene ektintis la sonorilegoj. Ili sonoris por averti, unu horon antaŭ ol la prediko. Ĉar ili estis malagordaj, unu basa, la alia tre alta, unu batanta rapide, la alia per longaj resonantaj frapoj, ili ŝajnis kiel drinkulo disputanta kun sia edzino. Kelkafoje ili sonoris pli laŭte, kvazaŭ en koleratako, poste ili redolĉiĝis; kaj la preĝeja turo brilis, kiel amaso da malplenaj boteloj.

Julien diris :

— Burbaki trinkis unu troan glason, hodiaŭ matene.

Burbaki oni alnomis la sonorigiston pro tio, ke dum la milito de Sepdek[1] li militservis ĉe la landlimo, kaj li ĉiam diris, kiam li estas ebria :

— Burbaki! mi konas lin.

Aline ridis.

— Vi scias, ŝi diris, iam kiam la pastro jam estis en la preĝejo, li ne ĉesis sonorigi.

— Jes, vino ne estas kosta tiun ĉi jaron.

— Kaj alifoje li ruliĝis malsupren la ŝtuparon, kaj faris al si truon en la kapon.

Tiam ili ekpensis pri la ligna ŝtuparo en la sono-

---

[1] (1870).

rilejo, kien oni supreniras por rigardi foren en la landon; ĝi estas ŝanceliĝa, la ĉarpentaĵo krakas, kaj sur la planko treniĝas la ŝnuregoj de l'sonoriloj. Kaj tra la fenestreto oni vidas la straton, similan al ŝtofrubando pinta ĉe la finaĵo, la tegmentojn, kiuj estas ruĝaj, la ĝardenojn, kiuj estas verdaj, kaj antaŭ la preĝejo la tiliojn rondformajn kiel brasikoj.

Kaj Aline diris :

— Mi, mi tre ŝatas la sonorilojn.

— Tamen ili ne estas tiel belaj.

— Jes, sed estus malĝoje, se ili ne plu sonorus.

— Ho! certe.

— Ĉu ne?

Julien diris :

— Kial vi ne surmetis viajn orelringojn?

— Mi timas, ke patrineto ilin vidus.

— Estas bedaŭrinde.

Aline respondis :

— Ho! jes.

Ĉesis tinti la sonoriloj. Oni aŭdis ankoraŭ kvazaŭzumadon, kiu baldaŭ haltis kaj tuj poste venis la dimanĉa silento. Kaj Aline diris :

— Mi devas rapidi hejmen, mi havas apenaŭ la tempon.

Julien sekvis ŝin per la rigardo. La vento svingis ŝian blankan ĉapelon, kaj kiam ŝi pasis post arbetaĵoj, oni ĝin ekvidis solan kaj similan al birdego sur la brancaj pintoj.

Sed duan fojon tintis la sonoriloj. Estas la momento, kiam la pastro eniras. Li eniras kaj la kantestro sidas ĉe sia kutima loko sub la katedro. Kiam la kantestro kantas, li sin strecas sur pinto de siaj elastaĵaj ŝuoj por eligi sian voĉon, kaj li puŝas ĝin antaŭ si aeren kiel sapoglobeton. Iajn psalmojn oni scias, aliajn oni ne scias; ĉiuj estas malnovaj, kun multaj longnotoj kaj silento inter ili por rekapti spiron. La vitraĵoj ne estas tre puraj, taglumo estas iom malgaja, kvankam suno brilas, kaj okaze oni aŭdas homojn, kiuj babilas sur la vilaĝplaco.

Restinte sola, Julien kuŝiĝis surventre kaj maĉis herbtrunketon, dum li pensadis. Li estis kontenta, ĉar li sentis sin kiel viro, kiu havas virinon por si. Kaj en sia kapo li imagis al si Alinen, kiel ŝi estas, kun delikataj brakoj, kolo bruna supre kaj blanka malsupre, kaj brusto movetiĝanta sub la korsaĵo. Li diris al si : « Kial ŝi iras al la prediko? Mi enuas ». Kaj ankaŭ li pripensis, ke la kisoj ne estas ĉio.

III

Tamen la mondo estas tia, ke ĉe unu fino trovigas la junaj, kiuj ridas aŭ ploras, ĉar je tiu aĝo oni ridas kaj ploras multe, kaj en la mezo la homoj, kiuj laboras; sed ĉe la alia fino trovigas la maljunaj, kiuj vivinte rigardas la vivon. Ili havas okulojn pintajn kiel najloj. Ili amasigis sperton por la junaj, kiuj ĝin ne havas. Tiam ili balancadas sian kavigitan vizaĝon. Kiam oni havas nur unu filinon, oni deziras ke ŝi estu el la bona speco. Filinoj el la bona speco povas kuiri, kamplabori kaj triki ŝtrumpojn; ili amuzas sin nur dum libera tempo. Kaj maljuna Henrikino, vidante, ke Aline ĉiuvespere forkuradas kaj eliras, kvankam ŝi devus ne agi tiel, maltrankviliĝis pri ŝi pro la tentoj, kaj diris:

— Mi ne volas, ke tio daŭru.

Nu, lundon vespere, la naŭa eksonoris kaj Aline

ne estis reveninta. Oni aŭdis pordojn fermataj unu post alia, la pordegojn de la garbejo, kiuj estas altaj kaj larĝaj, kaj grincas kiam oni puŝas ilin per la ŝultro, la rustintajn pordojn de la bestejo kaj la pordojn de la loĝejo, kiuj faras preskaŭ nenian bruon. La ĉielo estis verda kiel herbejo, kaj la arboj jam nigraj interne.

Henrikino eklumigis la lampon. Poste ŝi diris al si : « Ŝi ne revenas, kion ŝi faras? » Poste la unua kvarono eksonis, kaj ŝi diris laŭte :

— Dio mia! ĉu okazis malfeliĉo?

Ŝi malfermis la fenestron kaj vokis :

— Aline! Aline!

dufoje, kaj neniu respondis, sed en la ĝardeno la ribujoj havis malbonan ŝajnon, kvazaŭ bestoj eksaltontaj. Poste la duono sonoris. Kaj subite eniris Aline.

Henrikino diris :

— De kie vi venas?

Pro sia kurado, Aline ne povis tuj respondi, la lumo de la lampo ankaŭ iom kapturnigis ŝin; ŝi metis la manon sur la okulojn, kaj staris kun koro batiganta, ĝis Henrikino per severa voĉtono ripetis :

— De kie vi venas?

Aline diris :

— Mi estis ĉe Eliza.

— Jen estas stranga horo por reveni.

Momenteto preterpasis. Aline sidiĝis. Tiam ŝi sentis, ke la patrino ŝin rigardas. Deturninte la kapon, ŝi ne povis vidi ŝin, sed sentis ŝiajn okulojn kiel du brulvundojn. Ŝia sango ekmoviĝis, unue en la fundo, poste pli supre kaj fine ĝi supreniris en ŝian gorĝon kiel bolanta akvo, kolorigis la vangojn per ruĝa ondo, kaj zumis en la oreloj; kaj fajriĝis ŝia kapo. Ŝi estus dezirinta ĝin kaŝi en la manoj, sed la patrino estis tie ĉi; kaj la patrino diris al ŝi :

— Mensogulino!

Aline ne respondis, la harradikoj pikis ŝin en la haŭto.

— Vi aŭdas, diris Henrikino, de kie vi venas?

Kaj Aline diris, mallaŭte, kiel infano riproĉata :

— Mi iris iomete en la arbareton.

— Tute sola?

— Mi renkontis ankaŭ Julien.

— Kiun?

— Julien.

Henrikino diris :

— Jen, bela aferaĉo!

Kaj ŝi aldonis :

— Ŝi eĉ ne estas dek-okjara! Vera bubino!

Poste ŝi skuis antaŭ ŝi sian maljunan manon kaj reparolis :

— Nun, estas finote.

Aline similis birdon, kiu konstruis al si neston. Vento blovas, nesto falas, restas nur disrompaĵoj. Ŝi komprenis, ke ŝi ne bone konas la mondon kaj ĉiujn barojn al amo. Oni iras, kien oni pusas la koro, oni akceptas kison, kaj duan kison, kaj oni ekvidas, ke la afero estas finita.

Sed Henrikino pensis : « Dio mia! kia zorgo! kia penado! Tiujn infanojn, oni multe suferas por naski ilin; komence ili estas tiel etaj, ke ŝajnas nekredeble, ke ili kreskos; ili havas ĉiuspecajn malsanojn; nu! poste ili alportas iom da plezuro, sed jen la knaboj ekhavas barbon, la knabinoj ekmetas longajn jupojn; oni havas pli da zorgoj ol antaŭe; feliĉe ni estas ankoraŭ tie. »

Tiel Aline preskaŭ neniam plu povis eliri sola, ĉiuokaze ne nokte, kiam ombro inklinas al malbono. Kaj Aline estis obeema. Sed oni estis forpreninta de ŝi tion, kio faras la vivon denove dolĉa, post la infaneca tempo, ĉe kiu ĝi havas gustumon sukeran. Dum la unuaj tagoj, ŝi for-

skuis sian ĉagrenon kaj alprenis bonintencajn decidojn, dirante al si : « Estis malpermesite, mi ne pensis pri tio; estas malgaje sed devige. Se mi renkontas Julienon, mi ŝajnigos kvazaŭ mi ne vidas lin; se li min vere amas, li venos. Li diros : « Mi volas edziĝi kun ŝi. Tio estos multe pli agrabla, mi ne ŝatas agi kaŝe ». Tiel ŝi parolis. Kaj ŝi iris en la ĝardenon sekvita de sia blua ombreto kaj de la somero, kiu kantas meze de la karotoj kaj super la muroj.

Sed okazis ke ŝia amo, grandiĝinta kiel kreskaĵo sub ŝtonplato, senordigis ŝiajn rezonojn kaj suferigis ŝin. Ĉiam pli forta ĝi kreskis, kaj ĉiam pli ŝi suferis. Ĉiu preterpasinta tago ĵetis kvazaŭ ŝtonon en ŝian koron; kaj ĝi fariĝis tiel peza, ke ŝi ŝanceliĝadis pro lacado. Ŝi perdis la rozkolorajn vangojn kaj apetiton. Ŝi rigardadis direkte al la strato, serĉante Julienon per la okuloj. « Kie li estas? ŝi diris al si; kiom mi dezirus lin revidi! » Kaj ĉiuvespere, je subiĝanta suno, kiam venis la horo, ŝi suferis pli akre, revidante la arbareton, herbejon kaj rivereton, kien emis ŝia spirito; ĉar la spirito posedas liberecon kaj ĝi estas rapida, sed la korpo estas alligata, kaj ĝin mokas la spirito. Kaj ŝi enviis la hirundojn, kiuj rondeflugis super la tegmento.

Tamen la tempo pasis malgraŭe per treniĝantaj paŝoj, kiel almozulo sur la strato. Ŝi daŭrigis labori, ŝi surmetis la saman robon kaj saman ĉapelon; ŝi estis nur pli malgaja; sed por konstati la signojn de l'ĉagreno, oni devas rigardi en la okulojn.

Tiaj estis la aferoj, kiam vesperon dum ŝi sidis sub la prunarbo kun la kapo kontraŭ la trunko, venas al ŝi la patrino.

Henrikino tenis trikotaĵon, sed ĉar estis tro mallume, ŝi remetis ĝin en la korbon; kaj kunigante la manojn sur siaj genuoj, ŝi diris :

— Vi estas ja malprava, tiel malbonigi al vi la sangon; tiaj aferoj baldaŭ forgesiĝas.

Ŝi diris nenion alian, sed vorteto estas ĉiopova; retrovinte kuraĝon kaj volon, la koro de Aline subite leviĝis. Ĝi diris :

— « Ne, tiaj aferoj ne forgesiĝas. » Tiam ŝi ekkonis la veran amon; ĝi konsistas el suferado; ĝi eksplodas subite kiel fajro en la nokto.

Ŝia unua amo estis la amo de l'knabinetoj, kiuj estas solaj kaj rigardas la stelojn, kaj jen junulo trapasas. Oni ŝatas fortikulon, ĉar oni estas virino malforta, kaj granda estas la mondo. Sed nun ŝia nova amo marŝis antaŭ ŝi. Ŝi deziris iri tuj al Julien, ĵeti sin kontraŭ li kaj petegi pardonon.

Henrikino estis sidanta, kaj sciis nenion pri ĉio ĉi. Ŝi ne moviĝis kaj ne parolis, trovante nenion plu por diri. Oni povis vidi ŝian kurban nazon kaj amason da jaroj sur ŝia arkigita dorso. Kaj rigardinte sian patrinon Aline deziris, ke ŝi mortu. Ĉar rekte antaŭen iras la amo, simile al ŝtono kiu defalas de la montoj.

Post ol enlitiĝis Henrikino, Aline prenis paperfolion. Ĝi estis blueta papero tia, kian oni vidas en la vilaĝaj butikfenestroj, meze de pipoj, malnovaj sapopecoj kaj harpingloj. Supre en angulo estis desegnitaj du manoj rozkoloraj kaj interligitaj kun belaj puntmanumoj kaj ĉirkaŭanta mizota krono; kaj sube oni legis : « Ne forgesu min. » Tian paperon uzas amikinoj por la datrevenoj, kaj geamantoj por amleteroj : ankaŭ uziĝas por donacoj; oni ĝin aĉetas po du folioj zorge konservotaj kaj flaviĝontaj ĉe la rando.

Aline trempis sian plumon en la inkujon kaj meze de la paĝo skribis :

« Kara Julien »,

Sed baldaŭ ŝi haltis, ĉar ŝi bezonis pripensi. Eĉ se oni amas plej eble, oni ne ĉiam scias kiamaniere esprimi, ke oni amas. Kaj eĉ pli malfacile

estas skribi; la vortoj kvazaŭ alkroĉiĝas al la plumo kaj ne volas malsupren. Dume la kandelo brulis. Kuloj okaze sin ĵetis en la flamon; tiam oni ekaŭdis kraketadon, kaj ili falis en la fluidiĝintan sebon. Aerfluo trablovis, kaj sur la muro moviĝis ombregoj.

Subite Aline reprenis sian plumon kaj ne plu haltis, ĉar nun venas la ideoj. De kiam ŝi ne plu iris lernejon, ŝi malkutimis skribi, kaj ĉar ŝiaj fingroj rigidiĝis, ŝi estis devigata penadi; pro tio ŝi eltiris la langon. La plumo ankaŭ estis rustiginta. Tamen zorge rondigitaj estis ĉiuj literoj, kaj la ĉefliteroj havis kiel sur skribmodeloj belajn bukojn, dikaĵojn kaj maldikaĵojn. Okazis tamen, ke la linioj supreniris ĉe la dekstra flanko, ĉar malfacile estas skribi sur senlinia papero ; kaj kelkafoje ĉe fino de l'frazoj, la vortoj estis trem-skribitaj.

Aline skribis longe. Fine ŝi subskribis sian nomon. La letero estis longa kaj plenigis preskaŭ du paĝojn. En ĝi estis dirite :

« Kara Julien »,

« Mi tiom timas, ke vi estas malkontenta, ke mi volas diri al vi, ke mi ne koleretiĝis, sed patrino

ne volas, ke mi iru, ĉar ŝi vidis min; mi estus tre dezirinta reiri, sed mi ne povis; nu, pli longe mi ne povas atendi; se vi volas, ni nin revidos kiel antaŭe sed pli malfrue; ĉu vi volas atendi min morgaŭ vespere ĉirkaŭ la deka apud la domo? ŝi dormos, kaj se vi ne povas, metu leteron sub la randarbetaĵo, tie kie staras la prunarbo; sed vi certe povos, ĉar mi amas vin, kaj diras al vi adiaŭ ĝis morgaŭ.

« Via amikino, kiu amas vin per tuta koro la sia ».

« ALINE ».

Kiam ŝi relegis sian leteron, ŝi ne povis kredi, ke ĝi estas skribita de ŝi. Ŝajnis al ŝi, ke iu diktis ĝin. Ŝi gluis la koverton, kaj skribis la adreson : Sinjoro Julien Damon. Ĉar dika estis la skribo kaj mallarĝa la koverto, la lasta vorto estis tranĉita en du partoj.

Preskaŭ tute brulinta estis la kandelo. Ŝi pensis al la patrino dormanta en la apuda ĉambro. Kio okazus, se la patrino ekscius? Sed ŝi firme decidis. Ŝi malfermis la fenestron, kaj ŝovis sin eksteren.

Estis la dek-unua. Vento blovis intermite en la strato dezerta. La pinta preĝejturo eliĝis el inter la tegmentoj. Jen estis la nokto, kiu timigas per

sia silento kaj siaj nigraj movigantaj formoj, sed malgraŭe Aline antaŭeniris, laŭirante la murojn. Sur la placo la trinkejo estis ankoraŭ lumigita. La fenestroj detrancîs sur la pavimo du rugajn kvadratojn, en kiuj oni vidis la peronangulon kun eluzitaj ŝtupoj, kaj mangujon; ĉio cetera estis en ombro. Ĉirkaŭ la kupra lampego de la trinkĉambro iris kaj venis la servistino, enordiganta skabelojn sur la tabloj, por ke ĉio estu preta por la morgaŭa matena balaado. Aline ekhaltis momenton. Kaj la letero falanta en la leterujon faris grandan bruon. Estis finite. Tiam kuragho forlasis ŝin.

Ŝi rapidis hejmen. Griloj seninterrompe ĉirpis en la kamparo; iam kaj iam la voĉo de l'bufoj simila al kotono aŭdigis el la lageto. Apud ŝi kato preterglitis. Kaj ŝi ŝanceligis sur siaj moligintaj kruroj.

La lumo tamen ŝin trankviligis. Ŝi timis precipe, ke la patrino aŭdos ŝin, sed la domo estis silenta. Ŝi dormis malbone. Songoj miksigis kun realo. Kaj elrevigante, ŝi diris al si : « Eble estos je morgaŭ vespere. » Denove ŝi pensis : « Ne, estas jam tiun ĉi vesperon! », ĉar noktomezo estis jam pasinta. Kaj ŝi frosttremis. Ĉe la kapo ŝi estis varma kaj ĉe la piedoj malvarma. Fine, tagigo ekaperis antaŭ la fenestroj kiel banderolo el griza

tuko; ŝi aŭdis, ke ellitiĝas la patrino, kaj ŝi ankaŭ ellitiĝis.

Henrikino diris al ŝi :

— Kiel frumatena vi estas!

Ŝi respondis :

— Mi ne estis dormema.

Ŝi eliris en la ĝardenon, la nuboj malligiĝis unu post alia. En la interŝiroj montriĝis pecetoj de blua ĉielo. Malplenaj estis la nestoj, la birdoj ne plu kantis. Kaj en folikavaĵoj gutetoj brilis kiel speguloj.

Aline similis al iu, kiu tuj forveturos por longa vojaĝo. Ĉiuspecaj ligiloj rompiĝis en ŝia koro. En ĝi estis bedaŭro pro la estinto kaj timo pro la nekonata; sed en ĝi ankaŭ estis fortaj deziroj similaj al ondegoj, kiuj puŝis ŝin al Julien.

Ŝi ekpurigis la kuirejon, kaj liginte sian kanaban antaŭtukon ĉirkaŭ la lumboj, frotis la kahelplankon surgenue. Kun sia tuta forto ŝi frotadis per brosilo kaj sapo por pasigi la tempon, dum la akvo ŝaŭmis kaj ŝiaj manoj violkoloriĝis pro ofta tordo de l'viŝtuko.

Poste ŝi purigis la telerujon kun la rebrilaj teleroj, malbrilaj tamen en la mezparto pro eluzo. Tagmezo venis.

Je horo de l'kafo eniris najbarino elprunti cerefolion por la vespera supo. Tiajn servojn oni faras inter proksimaj hejmoj. Kaj ŝi sidiĝis por iom babiladi.

— Jen norda vento.

— Jes.

— Estas signo de bela vetero.

— Eble ja.

Aline aŭdis nenion, kion oni diris. Al ŝi ŝajnis, ke ŝi havas orelojn ŝtopitajn per vakso. Kiel daŭras la tempo! Kaj ŝi pensis: « Ĉu oni vidas, kiel mi estas interne? » Ĉar ŝi kredis, ke devige oni vidas en ŝian koron kaj legas en ŝiajn okulojn. La tago jam kliniĝis al vespero. De longe estis la najbarino foririnta, portante la cerefolion sub brako en paperpeco. Kaj Aline ektimis.

Ŝi timis pro tio, kion ŝi faris sentime. Subite ŝi diris al si : « Kiel rapide flugas la tempo! « Kaj ŝi estis ĵus antaŭe dirinta : « Kiel malrapide fluas la tempo! » Sed amo estas tiel. Ŝi ankaŭ diris al si : « Jen suno, kiu subiĝas, mi devos baldaŭ iri. Ho! ne. » Kaj tuj ŝia koro respondis : « Kia feliĉo! »

Nokto alvenis. Ŝi iris apud la randarbetaĵo sed nenion trovis tie. Ŝi pensis : « Li tuj venos, li tuj venos! » Henrikino finis ordi la kuirejon. Vespero

alportas lacadon, ŝi estis dormema. Ŝi diris al Aline :

— Vi vidas, kiam vi volas vin almeti al laboro! Oni multe elfaris hodiaŭ.

Kaj Aline respondis :

— Ho! jes.

V

La rondiranta leterportisto havas larĝajn bluajn pantalonojn, ĉapeton kun ruĝaj fadenaĵoj kaj grizan kitelon. Li enordigas la leterojn en sia ledsako; poste li eniras en la domojn, kaj li eliras el la vilaĝo; oni lin vidas en la kamparo, kun lia griza kitelo ŝveligita de l'vento; fine li fariĝas etulo. Pli malfrue li revenas, ĵetas sian sakon sur benkon kaj diras :

— Finite.

Kaj ĉiu letero, kiun li liveras, estas novaĵo alvenanta.

Diris la leteristo al Julien :

— Jen io por vi hodiaŭ, ĝi ne venas el malproksime.

Ĉar li kutime ne ricevis multajn leterojn, Julien miris kaj pensis : « Tio ĉi venas de la vilaĝo. La skribo estas virina, sendube. De kiu povas ja esti? »

Li eniris la garbejon por legi.

— Tondron! li diris. Aline!

Tiam li relegis la leteron duan fojon por esti certa. Kaj li ridis tute sola, frapante al si baton sur la femuron. Li sin diris: « Mi, kiu kredis, ke estas finite, tio ĉagrenis min; kaj jen! nun nenio. Kiom ŝi devas min ami! »

Poste li komencis fajfi, tiom feliĉa li estis. La grenejo estis tiel alta, kiel preĝejo; oni vidis fojnon, pajlon, kaj, suprenirinte en la mallumon, la subon de la tegoloj kaj la latojn de la tegmento kiuj formis egalajn tavolojn ĝis la supro de l'muroj, kie taglumo trapasis; en la bovinejo oni aŭdis la remaĉadon de la bovinoj kaj bruon de katenoj; la fermentanta fojno odoris akre; kaj tra la pordo brilis la blanka tago kiel arĝenta lado.

Julien enprofundigis siajn manojn en la poŝojn. Li sentis sin firma sur la kalkanoj. En la vilaĝo oni diris pri li : « Por edzafero, li certe estas bona afero ». Lia patrino plaĉe ripetis : « Oni ne vidas multajn knabegojn, kian lin. » Kaj funde de sia ideo li pensis, ke lia patrino estas prava.

Damon la patro estis sindiko kaj riĉa. Li estis bonŝanca. Pro tio lia bieno, jaron post jaro, plirondiĝadis per si mem, kiel maturiĝanta kukurbo.

Li estis unu el tiuj personoj, kiuj sukcesas de la komenco; heredaĵoj venas, kaj krome nur unu filo. La mondo estas la mondo, iuj havas ĉion, la aliaj nenion.

Li posedis grandan domon konstruitan el bonaj ŝtonoj, kun flave pentritaj muroj, larĝa antaŭtegmento kaj vastaj kamenoj. Je unu fino estis la ĉambroj, je la alia la bovinejo kaj antaŭe la sterko, dika kaj kvadrata kaj bone glatigita sur la flankoj, kiel dua domo pli malalta. Hirundoj nestis sube ĉe la traboj de la veturilejo; ĉiun aŭtunon ili forflugis, kaj ĉiun printempon ili revenis. La fenestrokovriloj estis verdaj, kaj meze de la nigraj tegoloj troviĝis du literegoj L. D., faritaj el novaj tegoloj brilruĝaj kaj videblaj de malproksime.

Julien tagmanĝis bonapetite. Poste li jungis la ĉevalojn al la farmĉaro por endomigi la tritikon. Ĉe flanko de l'monteto la rikoltita kampo similis tukon el flava tolo sternitan en la griza kamparo. Garboj estis laŭ la tuta longo kuŝigitaj, unu flanke la alian. Kaj unu sola arbo staris, ĉar trunkoj malhelpas la plugadon.

Tiam la laboristoj, sidiĝintaj en ombraĵo, ekprenis siajn forkegojn; per unu frapo ili enpikis ilin en la firme ligitajn garbojn, kiujn ili surĉarigis

kun levitaj brakoj per fleksa movo de la lumboj; kaj sur la ĉaro Julien arangîs ilin tiamaniere, ke la pezo estu ĉie egala.

Li revis pri Aline. Li diris al si : « Ŝi havas okulojn tiom beletajn, tiom beletajn; oni ne scias, ĉu ili estas bluaj aŭ nigraj; ili estas bluaj, sed ankaŭ nigraj, laŭ la maniero kiel ŝi staras; oni kredus, ke ŝi havas pupajn okulojn; kaj ŝi havas tiom beletajn harojn. Mi estas akre kontenta revidi ŝin. Ŝia patrino, ŝi ne estas humorfacila; ŝi estas maljunulino; ŝi imagas al si ĉiuspecajn aferojn. Je la deka horo, ŝi diris. » Kaj li palpis la leteron en sia poŝo.

Tabanoj zumadis ĉirkaŭ la jungaĵo; kelkaj estis egaj kiel vespoj kaj harhavaj, kaj ili subite falegis; aliaj, etaj kaj maldikaj, turniĝadis longe antaŭ ol surhalti; ili ŝajnis kiel nigra vaporaĵo, kaj en ĝi la ĉevaloj kun sangaj ventroj kaj svingantaj vostoj palpebrumis kviete siajn grandajn bluetajn okulojn.

Tamen la garboj estis rapide surĉarigitaj. Julien kondukis siajn bestojn per la brido kaj kriis : « Hu! koko. Hu! Negrineto ». Streĉiĝis la tiriloj, kaj la radoj enprofundiĝintaj en la teraĵon eliĝis malrapide. Finiĝis la sezono de ĉerizoj, kiuj pendis sekaj ĉe la altaj branĉoj, kie birdoj venis piki

ilin ĉirkaŭ la blankiĝanta kerno. Dekliviĝis la strato, la radoj falis en la kavaĵojn, kaj la spikoj eliĝintaj el la garbamaso tintetadis ĉe ĉiu ekskuo, kiel metalo.

Julien klakigis sian ŝnurvipon. La knabinoj, rikoltantaj la grenon ĉe rando de l'strato, relevis la kapon por vidi lin preterpasantan. Kiam la vojdeklivo fariĝis kruta, li enŝraŭbis la haltigilon, kiu grincis. La malakcelitaj radoj sublevis dikan polvon plenan je tritikodoro. Kaj li ankoraŭ pensis : « Je la deka, vilaĝanoj kutime eliras el la trinkejo, sed hodiaŭ ili estos lacaj; tuta tago da rikoltado, tio tratrançcas la brakojn; ni estos solaj, des pli bone. Ŝi faros ĉion, kion mi volos. »

Ju pli malaltiĝis suno, des pli longiĝis la ombroj de l'arboj; baldaŭ ili paliĝis kaj intermiksiĝis en la krepusko suprenvenanta de el fundo de l'valetoj. Viroj kaj virinoj, rastilon surŝultre, elvenis laŭlonge de la rozkolora strato, kaj malaperintaj post arboj ili reaperis pli fore kontraŭ la orsimila ĉielo. Oni aŭdis harmonikon ludantan. Kaj la nokto kvieta ekkaptis ĉiujn bruojn pasante kaj forprenis ilin. Julien eliris el sia domo. Li deŝiris stangeton el arbetaĵo, kaj fleksis ĝin inter la fingroj. Aero estis freŝa kaj malpeza, kiel de-

likata akvo. En sia kapo intermiksiĝis ĉiuspecaj pensoj, kiuj kune faris plezuron. Kaj li ankaŭ bezonis marŝi.

Endormiĝis la vilaĝo, kiel ĉiuvespere; estis la momento, kiam la steloj eklumas; brilas ili en la ĉielo, kaj lumoj sur la tero; poste la lumoj estingiĝas kaj ripozo sterniĝas sur la homoj. La grandaj litoj havas malvarmajn tukojn. La mastro kuŝiĝas apud sia edzino, kaj la laboristoj sur la fojno, kaj poste la spacego restas sola kun la steloj.

Alveninte proksime al Henrikina domo, Julien haltis ĉe la alia flanko de la strato, sub saliko, kiu troviĝas tie, kaj atendis.

Maljuna Henrikino ne estis enlitiĝinta, du lumoj brilis. Julien diris al si : « Verŝajne ŝi atendas min, sed la maljunino estas malrapida; la momento ne ankoraŭ venis. »

Li estis tre certa, ke Aline venos, tamen al li ŝajnis la tempo longa. Li komencis numeradi ĝis cent, kaj ĉiufoje kiam li atingis cent, li diris al si : « Ankoraŭ unu minuton! » Kaj li diris :

— Jen la deka.

La horloĝo sonoris raŭke, kiel tusanta ĉevalo, kaj oni aŭdis la batilon refali.

« Jes, jen la deka, la maljunino ne volas en-

dormiĝi. Feliĉe oni aŭdas la horojn, ĉar estas tro mallume por vidi ilin sur la poŝhorlogo, kaj Aline ne havas poŝhorloĝon. Mi devas donaci unu al ŝi, se tio ne estas tro kosta; unu el ŝtalo, ĝi estos pli fortika. »

Kaj li rekomencis numeradi : « Unu.....du..... tri.....dek.....dudek ». Sed lia kapo turniĝis meze de tiuj ciferoj.

Li pensis : « Kio okazas? Je la deka, la virinoj devas esti kuŝiĝintaj, bone kuŝiĝintaj; estas tempo dormi. Kiel teda! » Liaj kruroj fariĝis rigidaj, kiel bastonoj fiksitaj en la tero. « Eble ŝi volis moki min, pensis li; ŝi tion elpagos! » Sed subite estingiĝis la lumoj.

Julien antaŭeniris ĝis mezo de l'strato. Li diris al si : « Ĉu ŝi min vidos nun? » Audiĝis brueto kvazaŭ glitado; griza formo montriĝis ĉe fenestro : estis ŝi. Li vidis ŝin venanta, ŝi estis sen ĉapelo, kaj ŝia vizaĝo estis simila al pala rondaĵo.

— Ĉu estas vi? diris li.

Ŝi respondis :

— Jes, faru senbruĉ.

— Ha! li reparolis, vi tamen estas tutbonulino!

Ŝi diris :

— Mi amas vin bone.

Ŝi estis kontraŭ li, li sentis ŝian varmon. Tiam

li ekprenis ŝin inter la brakoj, kaj premis ŝin sur sian bruston. Ŝajnis al li, ke li neniam povos premi ŝin sufiĉe forte. Li premis tiel forte, ke Aline preskaŭ ne povis spiri kaj ankaŭ li ne. Ili kredis, ke ili tuj mortos.

La nokto estis kuniginta nubojn; ili denove kovris la ĉielon, ili estis nigraj en la mallumo. Tra la truoj oni vidis steletojn tremantajn. Vento blovis tra la branĉoj.

— Kien oni iros? diris Aline.

— Ja, oni ne povas resti tie ĉi.

— Ho! ne. Iru ni en la arbaron.

— La nokto estas tro densa.

— Nu, konduku min.

Li respondis :

— Jes, lasu min agi.

Li forkondukis ŝin tra kampoj laŭ vojeto, kiu okaze perdiĝis en la herbon. Ĝi estis borderita de juglandarboj. Ĉe ilia pasado la ombro disiĝis, kaj post ili ĝi refermiĝis, kiel refalanta kurteno. Aline sin klinis kontraŭ Julien, li sentis tiun pezon, la sango ruliĝadis tra siaj vejnoj, li havis sekan buŝon kaj akvon sub la lango.

Ili tiel marŝis dum momento. Kaj ili sidiĝis ĉe la posta flanko de l'deklivo; tie la herbo estis dika.

— Jen bonega loko por dormi, diris Aline.

Julien respondis :

— Jes, ĉu ne!

— Vi ne scias, kiel mi estis la tutan tagon? Mi demandis al mi : Ĉu li venos? Hodiaŭ vespere, mi iris vidi, ĉu letero alvenis, kaj estis neniu letero; tiam mi pensis, ke vi venos, kaj mi resaniĝis, ĉar mi estis malsana, tial ke mi ne plu havas vin.

Julien diris :

— Kisu min.

Kaj ŝi kisis lin. Ŝi reparolis :

— Oni estas tiel bone tie ĉi. Kvazaŭ oni estus ĉe ni.

Poste ŝi fordonis sin, cedante iom post iom kiel fleksiĝanta junko, kaj jen ili estis kuŝantaj flankon ĉe flanko, tiel proksime, ke iliaj vizaĝoj tuŝiĝas. Ŝi ankoraŭ ekvidis anguleton de la nigra ĉielo super si, kaj ŝi vidis plu nenion.

La vento estingis la lastajn stelojn kaj blovis la nubojn norden per unu sola movo. Baldaŭ ekpluvis. Gutoj falis, komence larĝaj kaj malmultopaj, tiel ke oni povus ilin numeradi; poste, ili fariĝis mallarĝaj kaj densegaj; kaj aero preterpasis kvazaŭ mola bulego. Oni aŭdis ranon eksaltantan en la rivereton.

Tiam Aline sopiris; kaj Julien ripetis :

— Vi estas bonulino, tutbonulino.

Li aldonis :

— Sed vi scias, pluvas.

— Ĉu estas vere? diris ŝi. Ha! Dio mia! Mi estas tute malsekiĝinta.

Kaj li diris :

— Kisu min malgraŭe, ankoraŭ unu fojon.

VI

Dum ŝi kombis sin antaŭ sia spegulo, Aline sentis funde en sia koro kaŝitan ĝojon leviĝantan apud ŝi kaj vokantan per ŝia nomo. Ŝi ridetis. La glatigitaj haroj lumigis ŝian frunton, kaj ŝi estis freŝakve lavita. Lumo staris en la ĉambro simila al virino en blanka vesto. Estis tago de plensento, sed mallonga estas la tago.

Unue ŝi preskaŭ estis perfidata de la vento, kiu batigis la fenestrojn.

— Kiabezone, diris Henrikino, vi lasis vian fenestron malfermita, lastan nokton?

Ŝi ne sciis, kion respondi. Ŝi diris :

— Ja, mi estis dormanta

Kaj ŝi estis vigle riproĉata, sed pri sia sekreto ŝi silentis. Kaj estus preferinde por ŝi, se tio ne estus okazinta, sed ekzistas araĝo de la aferoj, kiu estas decidita de ĉiam; ni eniras per la malfermiĝantaj pordoj kaj la aliaj restas ŝlositaj.

Fumaĉis la forno, la fumo odoris kiel vanilo, la fajro malbone brulis, ankoraŭ blovis la vento. Aline miris pri ĉio, ĉar ĉio estis ŝanĝita. Estis ankoraŭ ŝia patrino, estis ankoraŭ la tablo kaj la seĝoj, la nigra fajrujo kaj la apuda brulligno, tamen ĉio estis aliiĝinta. Aŭ eble estis ankoraŭ la samo kun alio pli. Ankaŭ ŝi ne estis kiel antaŭe. Kaj neniam plu ŝi estos kiel antaŭe.

Tamen ŝin rekaptis la vivo. Ŝi vidis, ke oni devas agi singarde, kaj ŝi ne tiel agis. Ŝi tra-ekzamenis sian ĉambron. Ŝidiĝante sur rando de l'fenestro, ŝi bezonis nur fari salteton por eliri senbrue. Ŝi elblovos la lampon, kiel ŝi jam faris, sed poste ŝi aŭskultos kontraŭ la intermuro; per la spirbruo oni ekkonas, ĉu la najbaro dormas; kaj ŝi ŝnurligos la fenestrojn. Revenonte hejmen, ŝi purigos siajn ŝuojn kaj brosos la siajn jupojn; fine ŝi enlitiĝos sen lumigilo. Ŝi pensis : « Estas kvar aŭ kvin aferoj prizorgotaj. » Ŝi ne plu ruĝiĝis je mensogo.

Kiam vespero alvenis, ŝi agis, kiel estis antaŭ-fiksita. Ŝi eĉ refaldis siajn jupojn. Julien estis bone dorminta kaj bone manĝinta; li ridis, dirante :

— Oni vidas vian tibikarnon, feliĉe estas nokte.

— Sed vi scias, mi estis riproĉata.

Ŝi rakontis ĉion, kio okazis dum la tago, malplenigante sian koron, kiel oni malplenigas sakon, pro tio ke al ŝi ŝajnis, ke ĉio, kio koncernas unu el ili, koncernas ankaŭ la alian, kvazaŭ ili estus nur unu vivo.

— Kaj, diris ŝi, dum mi tagmanĝis, mi pensis, ke vi ankaŭ tagmanĝas; dum mi manĝis mian panon, mi pensis, ke ankaŭ vi manĝas vian panon, kaj mi havis multe da plezuro. Ĉu vi pensas je mi, kiam mi pensas je vi?

Li respondis :

— Certe!

Ĉiuvespere ili sin revidis. Ili sekvis la vojeton ĝis la loko, kiun ili estis elektintaj. Ĝi estis loko dezerta; randarbetaĵo borderis la deklivaĵon apud la strato; je la alia flanko la kampoj releviĝis; en la fundo fluadis rivereto; ega pirarbo tegis ilin per siaj refalantaj branĉoj, kaj la herbo estis tiel mola, kiel lito. Ilin rigardis la steloj. Ili estas tro multaj, oni ne povas ilin kalkuli. Iuj estas flavaj, aliaj verdaj, kaj aliaj ruĝaj. Kelkaj tremetas, kiel kandeloj je vento; aliaj estas fiksaj, kiel najloj enpikitaj en la ĉielo. Kaj ili ŝajnis kvazaŭa polvo.

El post la monteto eliĝis la luno; ĝi plilargiĝis malrapide, tranĉita ĉe malsupro segilsimile pro la

abioj; poste ĝi tute ronda kaj skuetiĝa ŝoviĝis sur la krutaĵon de l'ĉielo, kaj ĉirkaŭ ĝi vidiĝis konfuza lumaĵo, kiel pulvora krono. Ĝia lumo falante deigis de la branĉoj malvarman ombron, kaj la ĉielo subite ŝajnis senstela.

— Nu, diris Julien, jen luno leviĝas.

Aline respondis :

— Ŝajnas, kvazaŭ la arbaro brulas.

— Kiel ruĝa ĝi estas!

— Kaj nun ĝi estas tute blanka.

— Ĝi estas tiel granda, kiel kuko.

Iliaj voĉoj flosis momente super ili kun necerteco; kaj baldaŭ rebatitaj de la luno, ili perdiĝis en la arbetaĵoj.

Reparolis Aline :

— Ĝi havas du okulojn, nazon kaj buŝon, kvazaŭ persono.

— Ho! diris Julien, ĝi estas simila al kapo de mortinto.

— Ne parolu pri tio, diris Aline, tio alportas malfeliĉon.

La noktobestoj moviĝis en la arbetaĵoj, strigo aŭdiĝis en la arbareto, ili amis sin.

Tiam ŝajnis al ili, kvazaŭ ili falas en abismon; kaj ili restis longe en la fundo, duone svenintaj.

Sed iam post iam la tero, ĉielo, nokto rekonsciigis ĉirkaŭ ili; kaj ili sentis dolĉan lacadon tra la membroj. Plej ofte ili babilis malmulte, ne sciante kion diri. Aline diris :

— Mi amas vin tiom! tiom!

Li respondis :

— Ankaŭ mi.

Kaj estis ĉio. Ili ne bezonis alion, ol sin vidi kaj tuŝi. Aline metis sian manon en tiun de Julien, kaj sin ŝovis kontraŭ lia ŝultro; la malglata tolo skrapetis ŝian vangon. Ŝi diris :

— Tio pikas min, ĝi estas kiel harego.

— Jes, ĉar estas bona ŝtofo.

Kelkafoje ili parolis ankaŭ pri la estinteco. Ŝi bedaŭris la tempon perditan sen Julien. Kiam oni amas, la tempo en kiu oni ne ankoraŭ amis, estas kiel bela robo ne surmetita.

— Ĉu vi scias, diris ŝi, mi estis etulino, mi havis pupeton; iun tagon ĝi falis en la rivereton; oni rekaptis ĝin per longa stango, sed la brano estis fandiĝinta. Mi multe ploris. Nun tio amuzas min, sed tiam mi vere ĉagreniĝis.

Kaj li diris :

— Mi ankaŭ, iam mi kaŝiĝis en la pizejo. Pizkvadratajo ne estas granda, tamen sufiĉe alta;

kiam oni estas en ĝi oni vidas plu nenion; ĝi havas branĉojn, kiuj maskas ĉion kaj ĉirkaŭas kvazaŭ per brakoj. Mi estis frandema; bongustumaj estas la pizoj; kaj oni min serĉadis, sed mi respondis nenion, ĉar mi timis estiș kaptita. Ha!...la...la... dum tri kvaronoj de horo; kaj poste, amikoj miaj, kia vipado!

Ili ridis. Unu fojon ŝi komencis plori. Li ne komprenis, kion ŝi havas. Li diris :

— Kion vi havas?

Ŝi respondis :

— Mi ne scias.

— Ĉu mi ĉagrenis vin.

— Ho! ne.

— Tiam, kion?

— Estas pro tio, ke mi amas vin.

Sed laŭ ideo de Julien oni ne bezonas plori pro tio, ke oni amas. Oni bezonas nur sin preni kaj kisi. Jes, sed la virinkapoj ne estas tre firmaj. Ili ploras pro feliĉo, ili ploras pro malfeliĉo. Li vidis, ke Aline ne estas tiel, kiel li estas. Kaj li iom kompatis ŝin.

Li pensis pri la knabinoj, kiujn li renkontis. Oni ekiras ĉiuj kune je dimanĉo, oni iras en la apudajn vilaĝojn. Kaj tie oni interkonatiĝas. Tie troviĝis

knabegino ruĝa, nomita Johanino, kiu ridegis skuante la kapon; ŝi ne ploris, tiu ĉi. Kaj aliulino eta kaj maldika, kiu ĉiam havis pomojn en la poŝo kaj eltiris ilin dirante :

— Ĉu vi deziras unu?

Kaj ŝi mordis en ĝin tutmalfermante la buŝon, kaj oni aŭdis la pomon kraki. Julien pensis : « Nu malgraŭe, ili ĉiuj estas similaj. Ili havas harojn jen tiel ĉi, jen tiel; ili estas altkreskaj aŭ malgrandaj, ili ridas aŭ ploras, ne grave; ili fine ĉiuj venas. Ili ne povas vivi sen ni...

Sed Aline diris subite :

— Pri kio vi pensas? vi diras plu nenion.

Kaj li rekonsciis, ke ŝi estas apude.

— Pri kio mi pensas? Pri vi, nepre.

Tiam li premis ŝian brakon, por kriigi ŝin.

— Ho! diris ŝi ridante, lasu min, vi min doloriga s.

Sed li premis pli forte.

— Estas por ke oni sciu, kial vi ploras.

— Vi tre dolorigas min, vi scias, reparolis ŝi.

Kaj li diris :

— Tamen mi preskaŭ ne premas, mi apenaŭ tuŝas vin. Ha! se mi volus, vi vidus.

Poste, starigĝinte por reiri hejmen, li prenis ŝin

ĉirkaŭ la talio per ambaŭ manoj, kaj sublevis ŝin, por montri, ke li estas forta. Li diris :

— Ĉu vi volas, ke mi vin portu?

— Vi ne povos longtempe.

— Mi! atendu ĝis mi provos.

Kaj li forprenis ŝin en siaj brakoj, kiel infaneton, sekvante la randarbetaĵon.

— Vi ne estas tre peza, diris li. Ho! ne. Mi povus porti aliajn.

Kaj ĉar ŝi denove marŝis apud li :

— Vi estas ankaŭ ne tre granda.

Kaj li pensis : « Ŝi permesas ĉion facilanime. » « Tamen, li aldonis en sia kapo, estas ĉiam la sama afero. »

Kaj forfluis la semajno. Dimanĉon vespere, danciĝis en la vilaĝo.

Oni estis konstruinta dancplankon sub la ulmoj, post la trinkdomo. Ĉirkaŭ la kvina alvenis la muzikistaro; ili estis ses, tri piŝtokornoj, unu klarneto, unu buglo kaj unu trombono. Kaj trinkinte glason por refreŝigi al si la spiradon, ili sidiĝis sur la girlandizita estrado kaj la dancado komenciĝis. La kamparŝuoj takte batadis la plankon, kaj la muzikistoj ŝveligante la vangojn ludis senatente pro rutino. De malproksime oni aŭdis nur la trombonon,

kiu elŝiris egajn notojn interspacigitajn kiel ronkado; de pli proksime, la akraj piŝtokornoj miksitaj kun bruo de l'paŝoj batantaj la takton faris grandan bruegon. Post ĉiu danco la muzikistoj plenigis la glasojn kaj per unu movo englutis ilin, la popolo superplenigis la trinkejon, kaj la junulinoj kun ĉiukoloraj zonoj promenadis tra la vilaĝo.

Ruĝaj flagoj kun blanka kruco, aliaj verdaj kaj blankaj, flirtis ĉe la fenestroj de la trinkejo; paperlanternoj pendis ankaŭ super la perono. Ĉirkaŭ la tuta dancejo peĉodorantaj abiobrançoj kaŝis la ĉarpentaĵon. La infanoj ekfajrigis petardojn; ĉaretoj kun suprenlevitaj timonoj atendis antaŭ la domoj; kaj la krepusko estis rozkolora. Fine nokto ekvenis.

Aline kaj Julien aŭskultis la muzikon. Ĝi alvenis ĝis ili klara aŭ preskaŭ konfuza, laŭ tio se la hezitanta vento puŝis ĝin ĝis ili aŭ lasis ĝin refali. Ĝi elvenis de la ombro kaj ĝi estis malgaja.

Julien diris :

— Jen ili polkas... nun estas valso. Tamen se oni povus iri tien!

— Sed oni ne povas.

— Kompreneble.

Kaj li reparolis :

— Sed tio estas vere beleta, ĝi estas bonega muziko, personoj kiuj ludas ĉiam kune, kaj konas ĉion parkere. Oni komencas malfrue, oni ne estas tro varma. La trinkejestro havas famegan vinon. Nu, jen!

Ili silentis. Post fino de ario ĉesis la muziko; ĝi rekomencis preskaŭ tuj; kaj dum la silentoj oni aŭdis voĉekklakojn kaj ridegojn.

— Ili ne enuas, diris Julien.

— Oni estas ankoraŭ pli bone tie ĉi.

— Jes, sed oni ne devus vidi nin.

— Aŭskultu, diris Aline, ĉu dancu ni? Oni sufiĉe aŭdos la muzikon.

— Ho! ni iru tien, se vi volas.

Ŝi diris :

— Mi timis tion peti.

— Kial ne?

— Ial.

— Tiel, diris li, oni partoprenos en la dancado.

Ili dancis sub la granda pirarbo. Ilia spirado intermiksita varmigis al ili la vizaĝon. Kun kapo apogita sur ŝultron de Julien, Aline fermis la okulojn, kaj sin miksis iliaj kruroj. Kelkafoje pli-malfortiĝis la muziko, kaj ili piedbatis samloke; kiam ĝi rekomencis, ili turniĝis pli rapide, por

rekapti la takton. Kaj la tuta noktaĵo turniĝadis ĉirkaŭ ili, kun la pirarbo, monteto, arbareto kaj eĉ ĉielo kaj steloj, kiel tutmonda dancego.

Longtempe ili tiel turniĝadis. Sed Julien glitis sur la herbo. Kaj li pensis subite, ke la aliaj dancas sur planko kun lumo kaj trinkaĵoj, kaj ili, en malseka herbejo, sub arbo, kiel frenezuloj. Kvazaŭkolero eniris lian koron. Li haltis kaj diris :

— Sufiĉas!

— Jam!

— Nu, diris li, ni turniĝas de pli ol kvaronhoro.

Ili sin alrigardis. Ili povis apenaŭ vidi unu la alian. Nuksarboj nigraj kaj densaj kiel ŝtonegoj fermis la pejzaĝon.

Aline diris :

— Vi estas malbonhumora.

— Ho! diris li, mi estas laca.

Ŝi sopiris. La muzikistaro komencis la lastan valson.

Ne longe daŭras la vera amo.

VII

Je la sekvinta tago, pluvis. La ĉielo estis ŝargita super Ĝenevo, de kie venas la malbona vetero; frumatene la suno estis ruĝa. Kaj oni diris :

— Baldaŭ ekpluvos.

Tamen la rikoltoj estis endomigitaj, kaj pluvo alvenis oportune. Ĝi falis sur la tegmentojn kun bruo unutona, kiu endormigas. Ĝi elgutiĝis de la defluilo, simila je hararo. Sur la strato formiĝis rondaj lagetoj, kaj inter la lagetoj kanaletoj kruc-formaj kiel retmaŝoj. La postfojnoj bone nutritaj ŝvelis kaj verdiĝis. Julien rigardis la pluvon. Li pensis : « Finita por hodiaŭ vespere. Nu, oni povos frue enlitiĝi. » Kaj agrabla estis al li tiu ideo, ĉar li havis dormon regajnotan.

Tamen, je la postmorgaŭo, ankoraŭ pluvis. Enuo venas rapide, kiam oni povas fari nenion. Julien diris al si : « Mi iru al la trinkejo ». Tie troviĝis Konstant.

Ĉarpentistoj disigis la dancplankon. La flagoj, girlandoj kaj ĉio estis formetitaj. La trinkejo ŝajnis subite maljuniĝinta, pli nigra, krispita kaj montranta stukaĵon falintan diversloke sub la fenestroj. Ĉio estis mortiĝinta, kvazaŭ fulmotondro trapasis. Sur nigra tabulo kun flavaj literoj oni legis : Komunuma kafejo. Lada pendaĵo montranta kamparanon kun plugilo pendis malgaje ĉe pinto de sia portilo.

Julien supreniris la peronon. Haladzoj de vinodoro eliris el la koridoro. Tiun odoron oni plezure reflaras. Enirante la ĉambregon, li revidis la brunlignajn tablojn, la fajencan fornon, la surmurajn bildojn, kaj li fariĝis kontenta. Ĉe ekstremo de l'tablo Konstant sidiĝis tute sola. Kaj li ankaŭ ĝojis, ĉar li enuis. Li diris :

— Kiel! estas vi? Saluton!

Kaj ili sidiĝis kontraŭvizaĝe kaj kubutapogitaj por babili pli oportune.

— Kion oni trinkas?

— Duonon.

— Se vi volas.

Konstant estis altkreska knabego kun barbo samkolora kiel lia ruĝa haŭto, kaj tonditaj haroj iom flavruĝaj. Li estis pafisto. Pulveroj vidiĝis

en angulo de lia okulo. Li staris antaŭ la celtabulo firme apogita sur la kalkanoj, kaj celis longtempe levante la pafilon malrapide de la tero. Pafo aŭdiĝis kaj ruĝa flageto montriĝis ĉe la celtabulo. Preskaŭ neniam li maltrafis la celkartonon. Tiam li elsaltigis la kartoĉringon kaj diris trankvile :

— Jen ankoraŭ unu trafita.

Kaj li iris ricevi sian premion, kiu ĉiam estis la unua premio, bela supujo aŭ reguliga horloĝo. Pro tio li estis grava persono.

Servistino alportis la duonlitron. Julien plenigis la glasojn. Ili tosttrinkis.

— Je via sano!

— Je la via!

— Tio estas boneta novvino, diris Konstant.

Kaj li aldonis :

— Kion vi faradas? Oni ne plu vidas vin.

— Estas pro la rikoltoj, respondis Julien, tiom estas farota!

— Nur pro la rikoltoj? respondis Konstant, skuante la kapon kun ruza mieno. Tondron! ili multe okupis vian tempon.

— Certe, diris Julien, mi ankoraŭ sentas ilin en la brakoj.

— Tiam, vespere, ĉu vi rikoltas? Kaj tiu balo? Vi ne forestis eĉ de unu. Ha! la fripono.

Konstant gajiĝis. Liaj ŝultroj suprensaltis kaj refalis. Inter du fumrondoj li kraĉis teren. Poste li piedfrotis la plankon.

— Vidu tiun balon, vi estas malsaĝulo : ĉu oni tiel forkuras, estas malsprite! Balo! ĝis la mezo de nokto, ruliĝado! Vi scias, je balo, ĉiuj belulinoj, Julino, Heloizo kaj dekoj de aliaj, kaj muziko! Estis vidinde, ke eĉ la maljunulinoj dancis, kaj maljuna Gaŭdard, kiu aĝas en la okdekoj, krome! ke ili preskaŭ plu ne povas stari, tondron! Nu, ni junuloj estas nur du aŭ tri amikoj, kaj jen, unu ne venas.

La servistino aŭskultis, staranta apud najlita al muro afiŝo, kiu montris ridetantan vinberistinon kun mallonga jupo meze de vinberejo. Konstant malplenigis sian glason. Poste li kubutpuŝis Julienon.

— Kiu estas ŝi?

— Neniu, diris Julien.

— Kial do oni rakontas tra la vilaĝo?

— Kion oni rakontas tra la vilaĝo?

— Nenion, diris Konstant per la sama voĉtono. Julien sentis sin ĝenata. Li metis la pugnojn

antaŭ si sur la tablon, kaj premis la makzelojn kun mieno obstina.

— Diru almenaŭ ŝian nomon.

Julien diris :

— Vi incitas min.

— Ha! diris la alia, vi estas malbonhumora : estas nebona signo.

Julien respondis nenion. Ili eliris. Sur la placo granda lageto estis formiĝinta pro la pluvego, kiu ŝtopis la defluilojn. Infanoj kun suprentiritaj pantalonoj trakuris en la akvo elĵetante kriojn.

— Ĝis revido, diris Konstant, je la proksima fojo.

Pluvis la tutan tagon. Julien havis tempon refirmigi sian spiriton kaj rigardi sin interne. Lia humoro estis simila al tiu de la pluvo. Kaj li konstatis interne, ke fine plej bone estas vivi kviete. Ĉu tiom da maltrankviloj indas knabineto, blua jupo kaj iom-neniom da plezuro? Tamen ankoraŭ daŭris la plezuro, kaj jen lia humoro heliĝis, kaj li diris: « Despli malbone por ili! Ŝi estas tre beleta. » Tiel, ke fine li elektis mezvojon.

Dum nokto pluvo ĉesis. Skuis la ĉielo siajn nubojn, kiel birdo siajn plumojn. Je mateno la riveretoj malkreskis. Kaj suno brilis. Sur la vojoj, limakoj postlasis silkajn rubandojn.

Kiam Aline ekvidis Julienon, ŝi kuris renkonte, kaj diris :

— Ha! jen vi estas, kia feliĉo! Tri tagoj, estas longe.

Li respondis :

— Ĉu ne? Kia pluvo!

La deklivaĵo estis malsekiĝinta kaj la teraĵo glita.

Li reparolis :

— Oni ne povos resti tie ĉi.

— Ĉu vi kredas?

— Ni estus en akvo.

— Kion ekfari? diris ŝi.

— Oni iros promeni iomete.

— Nur tion!

— Kion vi volas, ne mi estas kulpa, ke pluvis.

Dum ili marŝis, Aline ekhavis ideon.

— Ĉu vi scias? Ni iru en vian ĉambron.

— Vi volas ŝerci.

— Ne, diris ŝi.

— Kaj la ligna ŝtuparo? La tuta hejmanaro aŭdus nin.

— Nu, en la mian.

— Ha! vi scias, diris li, oni vere povus kredi, ke vi malsaĝigas.

Oni aŭdis la arbojn spiri, la nokto kvazaŭ mov-

iĝis: kaj ĝi estis varmeta. Vaporeto treniĝis sur la arbaretoj.

Tamen, diris Aline, oni estus multe pli bone ĉe ni.

Ŝi estis malkvieta, ne sciante kial, ĉar la aero kiun ni spiras kaj tio, kio devas okazi, jam kvazaŭ estas sur ni. Ŝi sekvis Julienon. Ili vagis laŭhazarde. Tiam li pensis, ke estas nun la momento.

— Vidu, diris li, vi estas virino, la virinoj ne komprenas tion. Vi eĉ neniam eliras. Kiel vi povus spertiĝi pri la aferoj? Ni, kiuj estas viroj, oni vidas pli klare, kredu al mi. Vi scias, kiel ili estas en la vilaĝo, nur ĵaluzuloj. Kaj ĉiuj rakontaĉuloj. Se oni farus al ni malagrablaĵojn!

— Negrave! diris ŝi.

— Negrave? Male. Oni ne povus sin revidi.

Kaj li aldonis :

— Mi pripensis, kaj kun tia vetero kaj ĉio cetera, oni devus aranĝi po du fojoj semajne.

Aline ne komprenis tuj. Ŝi diris :

— Por fari kion?

— Por renkontiĝi.

Ŝi diris inter larmoj :

— Ne, mi ne volas.

Li diris :

— Tio ankaŭ min malĝojigas, mi tion faras por la bono.

Sed ŝi ripetis :

— Ne, ne, mi ne volas.

Kaj ne ĉesis la larmoj.

— Vi ne estas saĝa, diris li; vi ne scias, kio povus okazi al mi.

Ŝi enflaris, kaj turnante sin kontraŭ li :

— Kio? ŝi diris.

— Ĉu oni povas scii? Estu afabla! Pro mi.

Estis pro li; ŝi kapjesis, kaj ili haltis. Ili trovigis mezvoje sur la deklivo de l'monteto. Malsupre kuŝis la vilaĝo, enmiksita en ombro kun la arboj; homoj estis tie, kaj homoj estas malbonaj.

— Ha! diris Julien, mi amas vin ankoraŭ pli bone; sed ne, tio ne estas ebla, mi amas vin tiom, pli mi ne povas.

Li kisis ŝin surfrunte, liaj lipoj estis malvarmaj. Tamen, ĉar ŝi estis konsentinta, ŝi sentis meze de sia ĉagreno specon de feliĉo malgaja kiel vintra suno. Ĉion oni povas oferi al la amato, kiam la amo estas profunda.

Pasis ankoraŭ semajnoj. Nun ili estis malplenaj kaj nigraj por Aline, kun du tagoj lumhelaj, kaj

la cetera tempo estis plu nenio. Kaj jen siavice tiuj lumoj paliĝis. Tio efektiviĝis malrapide. Ili paliĝis kaj malkreskis pograde, kiel lampo en kiu mankas oleo. Io estis aliiĝinta, kio ĉiam pli aliiĝis. Ŝi restis sama, sed Julien ne plu estis sama. Li estis simila al homo sidiĝinta ĉe agrabla manĝotablo kaj ĝin forlasanta, kiam li estas sata. Li sin levas, kaj oni konscias, ke li tuj foriros, kaj oni ne povas reteni lin, tial ke lia amo estis nur malsato, kiu malaperas, kiel malaperas ĉia malsato. Kaj tiam ŝi restos sola. Ŝi sentis la feliĉon forglitanta el inter siaj brakoj, kiel malligita fasko da floroj.

Ankaŭ la sezono stariĝis inter ili kun la cetero. Mallongiĝis la tagoj, malvarmiĝis la noktoj. Aline okulserĉis la stelojn, kaj ne plu trovis ilin. La postfojno estis falĉita. La luno je komenco de sia kreskado ŝajnis rompita ringo. Kiam oni kondukas la bovinojn al paŝtejo, ili eliras ĉiuj kune svingante siajn sonorilojn. Ili anoncas aŭtunon, kiu sonoradas tra la vojoj. Oni jam rikoltis la unuajn pomojn.

Kaj iun tagon venis ektimego. Ili estis ambaŭ kune sub arbo. Homo preterpasis sur la strato. Ili rampante ŝovis sin en la randarbetaĵon. Pro la branĉoj ili povis vidi nenion, sed la paŝoj alprok-

simiĝis. Kaj baldaŭ haltis la homo. Julien kredis, ke ili estas kaptitaj. Fine ruĝa lumeto ekbrilis : la homo ekfajrigis sian pipon. Kaj li daŭrigis sian marŝadon, la paŝoj malproksimiĝis. Aŭdiĝis plu nenio.

Aline unua sin riskis elen :

— Venu, diris ŝi, estas finite.

Sed Julien estis havinta tian timegon, ke dum momento li ne povis paroli. Lia voĉo tremetis. Li diris :

— Estas malsprite ! Estus preferinde, ke ni disiĝu por reveni hejmen.

Kaj la sekvintan merkredon, li forestis la rendevuon.

VIII

Estis vespero simila al ĉiuj vesperoj. Ŝi staris ĉe la fenestro. Kiam Julien venis, li fajfis mallaŭte. Kelkafoje ankaŭ, kiam nokto estis hela, ŝi ekvidis lin sub la saliko. La strato lumetis tra la ombro, la muroj estis ankoraŭ varmetaj, ĉar estis somere; sed nun estis plennokto.

Unue ŝi kredis, ke Julien nur malfruiĝas. Oni ne ĉiam faras, kion oni deziras : tion ŝi diris al si. Sed ju pli pasis la tempo, des pli ŝi malkvietiĝis pro ĉiuspecaj imagoj. Pensiĝas pri malsano, pensiĝas pri morto; sed pri la vero, pri krueleco de l'viroj pli fortaj, ŝi ne pensis.

Kiam alvenis la dek-unua, jukis al ŝi la kruroj pro atendado; ŝi eliris sur la straton. La strato komence etendiĝas tute rekte, poste kurbiĝas direkte al la lerndomo; ĉe la alia flanko ĝi deklivigas en la kamparo, sub pomarboj. Post la bariloj, ĝardenoj. Ĉie, neniu.

Si direktis sin al vilaĝo. Ŝi pensis pri la tago, kiam ŝi alportis la leteron; estis pasinteco, tempo estinta. Kiel rapide turniĝas la vivo! Ĝi havas unu vizaĝon rida kaj unu vizaĝon plora; ĝi turniĝas kaj oni vidas ĝin ridanta; tuj poste oni vidas ĝin ploranta.

Kiam ŝi alvenis antaŭ la domo de Julien, Aline haltis. La domo, peza kaj kvadrata, montris fermitajn fenestro-kovrilojn. Ĝi ŝajnis diri : « Iru for! » kiel iu deziranta dormi. Aŭdiĝis nur la fontano. Aline rigardis la fenestron de Julien. Ĉu li povis ne diveni ŝin ekstere starantan kun okuloj streĉitaj al li? Sed nenio moviĝis sub la ĉiela rondaĵo, kie regas silento.

Tiam apoginte sin kontraŭ muron, ŝi atendis ankoraŭ longatempe. Fine ŝi malvarmiĝis, ĉar ŝi estis kapnuda kaj sen ŝalo. La nokta aero ĉirkaŭis ŝin, kiel tuko malseka. Soleco premis ŝin, kiel peza pugno. Ŝi enhejmiĝis nur post noktomezo.

La sekvintan tagon, trairis la vilaĝon trupo da bestomontristoj. Estis mateno, kiam la tamburo batadis. Antaŭe marŝis kamelo. Ĝi havis nudhaŭtajn makulojn, haregojn kiel malligita ŝnuro, pendantan ĝibon kaj longan kolon kurbigitan supre. Ĝiaj kruroj disapartiĝis malsuper la genuoj,

kaj pro tio ĝia marŝado similis al ruliĝanta ŝipo. Simio, vestita je generalo, sidis sur dorso de azeno, kiu tiris ĉareton. Grimacante li traserĉis sur si la pulojn. Kaprino sekvis.

Tamen duan fojon aŭdiĝis la tamburo kaj la prezentado komenciĝis. Popolo ĉirkaŭstaris, la tuta vilaĝo ĉeestis. Viroj tenis la pipon oblikve en buŝo kaj, ĉar ili estas viroj ridetis kvazaŭ por diri: « Taŭgas por infanoj ». La montristo havis ruĝan fulardon ĉirkaŭ kolo kaj pintforman feltĉapelon. Li unue kuŝigis la kamelon; tiu-ĉi faldis la antaŭajn piedegojn, balancante aeren dum longa momento sian postaĵon, kiel faliĝanta arbo; kaj subite ĝi surfalis teren. La homo sidiĝinte sur ĝin, diris kun itala akcento :

— Jen kiel oni ŝarĝas kamelon ĉe la dezerto. Oni surmetas barelojn, sakojn, ĉiuspecaĵojn, mil kilogramojn. Ili ne trinkas dum dek-kvin tagoj.

— Ha! diris iu, se ni ĉiuj estis tiaj, la trinkejestro ne prosperus longe.

Poste la simio pistolpafis. Ĝia vosto eliris de sub ĝiaj tunikobaskoj. Kaj, ĉar meze de la ĵonglado, ĝi ellasis sian sabron kaj gratetis sian kranion, la homo punis ĝin per vipfrapo.

Henrikino ne parolis; ŝi kunigis siajn pens-

fortojn por kompreni, ĉar ŝi estis unu el tiuj maljunuloj, kiuj havas muron ĉirkaŭ siaj ideoj. Kaj la aliaj virinoj estis similaj al ŝi. Ili diris :

— En nia tempo, ne vidiĝis tiaj bestoj; de kie ili venas?

— Tio venas el Afriko.

— Ĉu vere?

— Ho! mi bone scias.

— Sed ne la kaprino?

— Ne, nur simio kaj ankaŭ kamelo.

— Ĉu vi memoras? En nia tempo sin montris Kalabranoj kun ŝafhaŭtoj ĉirkaŭ la kruroj kaj speco de flutoj kun plenblovitaj vezikoj.

— Tiajn oni ne plu vidas.

— Estu Dio benita! De kie ili venis?

Sed Aline ne aŭskultis. Ŝi estis malgaja kaj pro tio kompatis la simion. Ĝi estis tiom maldika kaj havis larmojn tiel egajn en la okuloj! Kiam oni ĝin batis, ŝi dezirus preni kaj forporti ĝin en siaj brakoj; kaj ankaŭ la kamelon, sed ĝi estis tro peza. Kaj jen, la grimacoj de l'simio ridigis ŝin malgraŭ ŝia ĉagreno. Kaj jen, ŝi denove malgajiĝis pro la kaprino.

Estis starigita speco de ronda kvaretaĝa trabaĵo kun pintforma supro. La kaprino tien surgrimpis.

Ĉe ĉiu etaĝo ŝi iris ĉirkaŭe kaj salutis per levado de l'piedego. Por supreniri pli alten, ŝi strečis sin stare. Ju pli supren ŝi atingis, des pli mallarĝa estis la loko. Kaj almenaŭ du metrojn alta estis la trabaĵo. Oni pensis : « Se ŝi falos, ŝi rompos al si la membrojn. » Kaj la homo tamen klakigis sian ŝnurvipon.

Sed, je momento kiam la kaprino, kun hufoj kunigitaj ĉe supro de l'maŝino, rondiradis kiel turnludilo kaj salutfleksiĝis, Aline ekvidis Julienon. Ŝi ne vidis lin venantan, kaj subite li estis tie ĉi. Tiam ŝi ne pensis plu al simio, nek al kaprino, nek al kamelo.

Sekvis la monkolekto; tio estas la malbona parto, kaj ĉiu prezentis la dorson. Pala knabeto skuis teleron, ĝi estis preskaŭ malplena. La homo ŝultrolevante kalkulis la monon en la manplato, kaj la prezentado rekomenciĝis ĉe la alia fino de l'vilaĝo.

Foririnta estis Henrikino. Tiam Aline, tuj kiam sola, ŝovis sin ĝis Julien. Ŝi alproksimiĝis dorse, metis manon sur lian ŝultron, kaj dum li turnis sin, ŝi ridetis. Ŝiaj okuloj fariĝis denove helaj kiel montlagoj ĉe sunleviĝo.

Li konfuziĝis. Tamen pro la bestoj neniu atentis

ilin. De supre, la multaj kapoj formis kvazaŭ malhelan kronon, en kiu nukoj kaj vizaĝoj figuris rozkolorajn florojn. De malsupre, vidiĝis la kapeto de l'simio kaj ĝia ĉapeto, ornamita de blanka tufeto kaj ligita sub la mentono. Li ekpafigis sian pistolon. Kaj Aline diris :

— Kion vi faris hieraŭ vespere? Kial vi ne venis?

Li respondis :

— Oni vidis min vaganta la tutan tempon. Ni devas esti singardaj, vi komprenas.

— Mi atendis vin, diris Aline.

— Longatempe?

— Ho! jes, longatempe.

Dume la simio vipita kriegis. Kaj li reparolis :

— Ili turmentas tiujn bestojn!

Kaj li diris :

— He! la simio, ĝi havas internon de manoj kiel homo.

Ŝi diris :

— Nu, ĝis la venonta semajno; nepre, tiun ĉi fojon.

— Bone.

Tamen li jam forlasis ŝin, kaj puŝante sin per la kubutoj inter la grupoj, li baldaŭ atingis la an-

taŭan vicon. Poste li staris tie senmove ĝis la monkolekto. Tiam li ĵetis kvar spesdekojn en la teleron, dum la Italo diris salutante :

— Sinjorinoj kaj Sinjoroj, antaŭ ol foriri el via honorinda vilaĝo, mi deziras vin danki.

La kamelo strečis sian longan kolon, la simio mordetis karoton, kaj la azeno ektrotadis kun sia ĉareto, en kiu vidiĝis pecoj da ŝeka pano, la trabaĵo por la kaprino kaj ruĝa ŝtofo kun orgalonoj.

Julien revenante imagis al si Alinen, kiel ŝi venis al li, kaj ankaŭ kion li promesis. Nu, oni promesas, sed ne plenumas. Paroloj forgesiĝas, ili estas nur lipbrueto, kiu forflugas aeren kun la nuboj. Pli solidaj estas la rezonoj, ili estas ŝtonsimilaj, kiel domoj en kiujn oni eniras por sin ŝirmi. Li diris al si : « Vere, ŝi trograndigas la aferon; ŝi jam estas kvazaŭa frenezulino. Kio okazos, se tio daŭros? Mi tamen ne povas edziĝi kun ŝi; ĉe seriozaj geedzoj ambaŭ posedas havaĵon; ŝi havas preskaŭ nenion. »

Ankaŭ li diris al si : « Jen nun, kion fari? »

« Ŝi estas plorema, eble kriema! Se ŝi okazigus spektaklojn, estus bela aferaĉo. » « La sola rimedo estas sin kaŝi. Ŝi venas, nu, mi foriros. Ŝi fine

komprenos ». Kaj li aldonis pense : « Cetere mi ne estas la sola, ŝi trovos alian. »

Florintaj estis la kolĉikoj, tremetantaj flametoj, blovataj de l'vento; ili estas nenio, la palaj fratinetoj de l'nebulo.

IX

Kiam Aline konsciis sian malfeliĉon, ŝi ne volis kredi je ĝi. Tiel agas la knabinetoj, kiuj sin kaŝas sub la littukojn pro timo al nokto. Ŝi sin alkroĉis al ĉiuj eblaj esperetoj, sed rompiĝis ili unu post alia en ŝia mano. Oni eĉ ne havas tempon por bone ami; amtempo pasas kiel fulmo.

Aŭtuno montriĝis ĉe pinto de l'arboj kaj la trafitaj folioj flaviĝis. Ili similis en la branĉoj al beletaj helaj birdoj tuj ekflugontaj. La lumo kribrita estis mola, kiel frukto tro matura. La hundoj oscedis strečante sin en la dezerta korto de l'farmejoj. Vespere, fumoj el rubfajroj tremiĝis super la kampoj, kiel blankaj raŭpoj.

Aline sentis, ke la vivo estas kelkafoje tiel malfacila, ke oni preferus ĝin tuj ĉesigi. Oni fermas la okulojn, kaj oni lasas sin forportiĝi kiel folio en rivereto, sed ŝi pensis : « Estas neeble, ke ĉio estas

finita ». Ŝi sekigis siajn larmojn kaj relevis la kapon.

Iun matenon mortis la invalidineto. Ŝi estis kiel kutime en sia lignorada ĉareto; je tagmezo oni trovis ŝin tute malvarma; ŝi estis mortinta sola, oni nenion aŭdis; ŝi eĉ ne moviĝis. Kaj oni diris : « Kiel tio okazas! Nu, ŝi almenaŭ ne plu suferos nun ». Sed Aline komprenis, ke tio estas signo por ŝi.

Refalis pluvegoj. Tia estis la vetero tiun ĉi jaron. Ne ĉesis densa pluvo kiel strečitaj ŝnuroj, kaj la vento mansimile saltis de unu al alia, kurbigante ilin; poste vidiĝis plu nenio; nur kvazaŭ griza punkto sin sublevas kaj malkovras angulon de nigra kaj malgaja arbareto, fore en la kamparo. Kaj la arboj grincis ĝemsimile.

Okaze Henrikino kun jupo relevita super la kapo, kuris meti sitelon sub la pluvdefluilon. Aline pensis : « Ha! jes, patrino portas la sitelon. » Kaj Henrikino skuadis sin en la kuirejo dirante : « Ne plu estas ĝardeno, estas lago! »

Tiam dum nokto la dometo, ŝajnanta tute eta sub la ĉielo, refaldis sian tegmenton kvazaŭ flugilojn; nuboj glitis sur la luno; ĝi aperis momente kaj ŝajnis forflugi. Kaj tra la fenestro Aline vidis ĝian

helon tremeti kaj estingiĝi en la vento, ĉar ŝi ne dormis.

Ŝia ĉagreno malebligis al ŝi la dormadon. Dum horoj ŝi klopodis en sia kapo, rememorigante al si unu post alia la pasintajn tagojn, kiel rozarion, kiun oni traripetas kun ĉiuj siaj kulpoj, por sin kulpigi je ili. Ĉar sin ŝi kulpigis, ne Julienon. Ŝi estis iam malafabla kontraŭ li, kaj knabegoj ne ŝatas la malbonhumoron. « Verŝajne Julien koleriĝis, sed li diris nenion, ĉar li kutimas nenion diri ». « Kaj, ĉe la balvespero, kial li plu ne volis? Estis tre beleta tamen, kaj mi faris ĉion, kion li volis. Ha! Dio mia! vere estas malfacile. »

Ŝi pensis : « Oni ne scias; li certe estis bona, jes, certe bona. Li donacis al mi orelringojn. Oni faris donacetojn unu al alia. La tagon, kiam li alportis al mi frambojn, mi bone dankis lin. Ĉu eble li kredis, ke mi ne estas kontenta? Li tamen devas scii. »

Ŝi sidis en sia lito kun okuloj malfermitaj kaj fiksitaj antaŭen. La mallumo ŝajnis io profunda kaj densa kiel nigra felo. Ruĝaj kaj bluaj suno etoj supreniĝis turniĝante en aero. Ŝi frotis al si la okulojn. Ŝi demandis sin : « Kion mi havas? Kion mi havas? Kial mi estas en tia stato? Ĉu

punas min la bona Dio? » Ŝiaj pensoj estis kiel abeloj, kiuj eliras ĉe fulmotondra vetero. Ŝi ne povis trovi oportunan lokeĉon en sia lito, ŝia kapkuseno estis varmega; jen ŝi malkovris sin, kaj frostotremis; jen ŝi ree kovris sin, kaj la tukoj pezis sur ŝin kiel ŝtono. Kaj, kiam dormo venis, ŝi havis songojn kun iliaj trompoj, en kiuj ŝi estis feliĉa, kaj ĉe vekiĝo ili frakasiĝis, kiel vazo falanta el manoj; aŭ alispecajn, similajn al la realeco kun ĝia malgajo; aŭ ankoraŭ aliajn, tiel timegigajn, ke ŝi kriis eĉ dormante.

Iam, ŝi estis sub granda arbo, kaj Julien estis supre kaj diris: « Venu. » Kaj ŝi faris, kiel li diris. Li sidis ĉe fino de brancxo, kaj ŝi sidiĝis apude. Kaj jen, la arbo komencis kliniĝi kaj kraki, ĉar ili estis tro pezaj, kune; kaj ŝi sentis, ke Julien glitas, kaj ŝi ankaŭ; kaj ili falis en la malplenaĵon, kun aero enpenetranta la buŝon kiel tiklanta plumo, kaj forta premado en la gorĝo ekvekis ŝin subite.

Alian fojon, ŝi songis, ke oni enterigas ŝin viva. Oni malsuprenigis ŝin en grandan kavaĵon, kiu estis tute nigra. Super ŝi vidiĝis ĉielanguleto, kaj ĝi fariĝis ĉiam pli malgranda, fine nur blanka punkto; kaj samtempe ŝi sufokiĝis.

Ŝi paliĝis. Malaperintaj estis ŝiaj belaj koloroj,

kiel senfoliiĝas sovaĝrozo. Ŝi multe malgrasiĝis; la rondaj manradikoj fariĝis angulaj kaj tro mallarĝaj, kaj ŝi havis ŝnuraĵojn sur la manoj, kiel maljunulino; ĉe la enkaviĝintaj tempioj vidiĝis viola bukedo da vejnetoj; kaj ŝi manĝis plu nenion.

Henrikino diris al ŝi :

— Nu, manĝu.

Ŝi respondis :

— Mi ne malsatas.

Kaj ĉar ŝi tusis, ŝia patrino reparolis :

— Jen vi tusas, vi nebone fartas. Kial vi ne volas zorgi pri via sano?

— Estas la vetero.

— Mi diras, ke la sanon oni devas zorgi. Oni tusas, oni tusadas! Se oni venigus kuraciston?

— Ho! ne.

Henrikino malkonfidis, ĉar al ŝi sajnis, ke tiu malsano estas strangaspekta. Tamen, virinoj ofte havas malagrablajn momentojn. Kaj Aline kredis komence, ke pro sia ĉagreno ŝi estas malsana. Poste, doloris al ŝi la dorso, poste la stomako, kiel brulumo, fine ŝi vomis. Kaj iun matenon, subite, ŝi konsciis, ke ŝi portas infanon. Tiam ŝi nur pensis : « Mi devas tuj sciigi al li ».

X

Ĉe la fontano, lavistinoj lavis la tukaĵaron. Per ambaŭ manoj ili frotadis sur la glata lavtabulo, la sapo ŝaŭmis, kaj la akvo estis blua kaj dolĉodora. En la mateno la laboro urĝas. Unu virino revenis de la butiko kun funto da sukero. Alia balaadis antaŭ sia pordo. Knabegino kondukis infaneton per la mano. Aŭdiĝis la lignaĵisto rabotanta en sia laborejo. La vetero estis grizeta, malvarmeta, kaj iomete da vento blovetis. La ĉielo montris blankajn nubojn tute rondajn kaj intertuŝiĝantajn, kiel pavimoj en ĉevaleja korto. En la kamparo bovinoj svingadis siajn sonorilojn ĉiuflanken.

Kaj unu el la lavistinoj, tordante sian tukaĵon, diris :

— Estas la dek-tria hodiaŭ.

— Ne, diris alia, estas la dek-kvara.

— Des pli bone.

— Kaj mi, diris tria virino, mi certigas al vi, ke estas la dek-tria.

Tiam pasis Aline. Kaj ĉiuj ĉesis paroli.

Apud la garbejpordo post la domo, Julien dishakis lignon. Kolomboj kukrukuis sur rando de l'tegmento. Maldekstre la fruktoĝardeno perdiĝis en la kamparo. Tra la truaĵoj de l'branĉoj vidiĝis ruĝaj pomoj de malfruiĝinta pomarbo. La aliaj havis plu neniujn fruktojn kaj preskaŭ neniujn foliojn. Julien laboris senĝene, ĉar li estis hejme. Li forprenis sian veŝton, tial ke varmigas la movado. Supren kaj malsupren iris la hakilo; je ĉiu frapo fendiĝis la lignoŝtipo. Kaj kiam Aline venis, li restis tutan minuton senmove kun hakilo en mano.

Kolombo forflugis super iliaj kapoj. Julien malfermis la buŝon, kvazaŭ por paroli, sed li' diris nenion. Kaj ŝi ankaŭ diris nenion komence, sed poste venis la paroloj sur la lipojn, kiel akvo en pumpilon, kaj elŝpruciĝis ĉiuj kune.

— Vi ne scias, diris ŝi, mi tre dezirus ke ne... sed... jes, estas la vero. Mi ne estis certa... Estis la unua fojo... kaj estis neevitebla, ĉu ne? Kaj ĉar estas vi, pli bone estas, ke mi al vi diru.

Ŝi parolis hezitante je la vortoj, kiel blindulo

palpadante per la manoj. Ŝi tordis per la fingroj la ŝnurojn de sia antaŭtuko. Ŝiaj vangpometoj estis ruĝaj, kiel du brilaj fajretoj. Ŝi portis blutolan korsaĵon kaj malnovan brunan jupon.

Diris Julien :

— Kion?

Ŝi montris sian ventron, kaj diris :

— Infano ekvenis.

Dua kolombo forflugis. Julien diris :

— Ĥajbon[1]!

Kaj li ripetis :

— Ĥajbon!

Enprofundiĝis lia kolo en la nukon, kaj simila al kornpikonta virŝafo, li ĵetis kapon antaŭen; tamen kredante, ke Aline eble mensogas, li sin retenis, kaj diris :

— Vi estas freneza!

Ŝi respondis nenion.

— Vi estas certa?

— Ho! jes.

— Certa, certega?

— Ho! jes.

Tiam li denove antaŭen ĵetis la kapon kaj diris :

---

[1] Svisa esprimo tre forta.

— Nu! Vi estas nur malspritulino; tio ne plu koncernas min.

Kaj forĵetinte la hakilon, li foriris.

Sed lin sekvis Aline, marŝanta post li, kiel almozulino, dirante :

— Aŭskultu : ĉar estas nun tiel, oni estus bone, ambaŭ kune. Vi koleras, pro surprizo; ĉu ne? Kiam vi pripensos...

Li haltis, kaj diris :

Forkuru de mi tuj!

Ŝi pinĉis al si la vangon, kvazaŭ ŝi volus ĝin mordi per la fingroj; kaj per la alia mano ŝi tenis Julien je lia ĉemizo; ŝi ligis sin al li por lin reteni, kaj ŝi estus volonte akceptinta batojn, eĉ fortajn batojn, se nur ŝi povus resti kun li, kaj ŝi diris :

— Ho! Vi scias, mi amas vin bone, ĉiam pli; kaj la infaneto apartenas al vi; ni geedziĝu, mi estos tiom bona al vi.

Sed li tute ne intencis bati ŝin; li nur deziris, ke ŝi estu for, ke li povu forblovi ŝin kiel fumeton; pro tio li ripetis :

— Mi ne zorgas, kion vi diras. Forkuru tuj!

Je tiu momento, Damon la patro eliris el la ĉevalejo. Li estis malgranda kaj dika, kal li marŝis kun disigitaj kruroj. Aline ektimis. Ŝajnis al ŝi,

ke la arboj de l'ĝardeno frakasiĝas ĉiuj kune, kaj ke nokto kovras la ĉielon. Ŝi forkuris. La vilaĝdomoj ŝajnis kuri renkonten laŭ la strato. Ŝi havis kvazaŭ maldiafanan akvon en la okuloj. Kaj kiam ŝi ekvidis sian patrinon, la fortoj forlasis ŝin, ŝi falis sur seĝon, tenante la kapon inter la manoj.

* * *

Henrikino ne komprenis tuj. Kiam ŝi ekkomprenis, estis finite : returnita estis ŝia amo; severa kaj kruela amo, kiu punas. Kiam oni estas honesta, oni havas infanojn honestajn. Komence ŝi forte koleris; ŝi diris :

— Ĉu vi estas mia filino?

Kaj la kolero sekigis al ŝi la koron.

— Unu filinon, unu solan, kaj jen ŝi estas! Mi devus diri al vi: « Foriru aliloken, kien vi povos. » Mi ne forpelos vin, sed iru rekten nun; se vi deflankiĝos...

Ŝi fermis la pordon. Stariĝis la ideoj en ŝia kapo, kiel verdfreŝa ligno en fajro; ŝi movadis la brakojn kaj ŝia buŝo kunmoviĝis. Poste ŝi alrigardis sian filinon. Aline sidis kvazaŭ ĉifonamaso ĵetita tien, kaj okaze sublevita el interne. Vidiĝis

nur ŝiaj haroj malorditaj ĉirkaŭ la kapo, kaj ŝiaj tremplenaj manoj.

Fine ŝi diris al ŝi :

— Iru liten.

Aline obeis. Ŝi sin senvestigis, pensante pri nenio. Iris kaj revenis ŝiaj fingroj kvazaŭmaŝine, pro kutimo. Ŝi ŝovkaŝis sin sub la littukojn, hontante eĉ je la taglumo. Tamen Henrikino preparis kamomilon. Oni metas sep da ili en tason, nek pli, nek malpli, ĉar sep estas la nombro; kamomilo taŭgas por ĉiuj malsanoj; oni verŝas sur ĝin bolantan akvon. Aline trinkis ĝin; ĝi estis amara kiel ŝia vivo.

Poste ŝi turnis sin kontraŭ la muro. Kaj lacado superis la doloron. Ombro sterniĝis longe sur ŝiajn palpebrojn. Ŝajnis al ŝi, kvazaŭ ŝi refariĝas knabineto, je la epoko kiam oni ludas kun fazeoloj; oni faras truetojn apud muro; ĉiakoloraj estas la fazeoloj; vespero malsupreniĝas, kaj la hirundoj flugadas are ĉirkaŭ la preĝejturo.

DUA PARTO

I

Novembro estis veninta.

— Jes, diris Henrikino, iun tagon, vi devos havi almenaŭ la necesaĵojn por vesti la infaneton kiam li estos tie.

Aline prenis fadenon kaj tolon, kaj komencis kudri. Ŝia patrino kalkulis jene :

— Du aŭ tri vindotukoj, kvar ĉemizoj kaj naztukoj; vi havos tiom da laboro, kiom vi volos, kaj tempon nur sufiĉan.

Malglata estis la tolo, ĉar infanoj de malriĉuloj ne havas delikatajn tukojn. Aline kudradis, flugis la fingroj, brilis la kudrilo; sed tiun laboron ŝi ne ŝatis; ŝi faris ĝin nur pro neceseco. Kaj Henrikino silentanta ŝin observis, sidante apud ŝi kaj dirante ĉiumomente :

— Ne tiel. Je kio utilis, ke mi vin instruis? Rigardu do tion. Ĝi estas tute krispita, vera mizeraĵo!

Ŝi prenis la laborajĵon, kaj ĉion redisigis. Tamen Aline penadis tiom, kiom ŝi povis. Sed rekta devas esti la borderajĵo, kaj egale interdistaj la kudropunktoj, kaj ankaŭ oni devas atenti, ke la fadeno ne rompiĝu : oni devas zorgi pri tiom da aferoj, ke la kapo perdiĝas. Kaj ili estis ambaŭ tie, tute solaj, vizaĝon kontraŭ vizaĝo, kun vintro ekstere.

Tute solaj ili estis. La kuirejo havis kvar murojn kaj unu fenestreton. Regis malgajo. Ili ne parolis.

Kaj Aline pensis pri la havota etulo. Ŝi sin demandis : « Kiamaniere li ekvenos? Ĉu oni suferas? Ho! Certe tio multe dolorigas! » Ŝi memoris pri amikinoj, kiuj ekhavis fratetojn. Ili diris :

— Oni metis nin en la supra ĉambro, sed tamen ni bone aŭdis la dolorkriojn de patrineto.

La akuŝistino venas, kaj kelkafoje ankaŭ la kuracisto. Kaj Aline multe timis. Poste ŝi diris al si : « Kiel mi ŝajnas? Mi miras. Kiel strange estas havi knabeton? Aŭ eble ĝi estos knabino. Oni ne scias antaŭe. Nur kiam ili estas tie ĉi venas la surprizo, tamen mi preferus knabon. » Ŝi reprezentis lin al si pense; li havos egan kapon kaj fe-
murojn kiel ŝnuritaj kolbasoj.

Ŝi ankaŭ imagis al si la robon, kiun li surmetos.

Ili alportas multe da plezuro, kiam ili komencas paroli.

Kaj subite ŝi memoris, ke ŝi ne estas kiel la aliaj. Tiuj, kiuj havas edzon, povas esti ĝojaj kaj multe ridi; la tutan tagon, ili manĝas por havi lakton. Vespere, ĉe la freŝo, ili kunprenas la infanojn; iras de pordo al pordo tra la vilaĝo. Oni diras al ili « Kiel fartas? » « Ne malbone, dankon. » « Kaj la etulo? » « Ho! la etulo, nur rigardu ĝin! » « Ho! kiel bela infaneto! » « Ĉu ne? Ĉu vi scias kiom li pezas? li jam akiris pli ol kvin kilogramoj. » « Ne eble! » Kaj la patrino estas feliĉa, tial ke oni ne volas kredi.

Sed la senpatrajn infanojn, tiujn oni timas montri. Ilin oni lasas hejme; ilin oni silentigas, kiam ili krias; ili grandiĝas, kaj iras al lernejo; la aliaj infanoj ne ludas kun ili; oni donas al ili alnomojn. Aline pensis: « Ne nur mi, sed li ankaŭ estos punata? Kial? Kaj Julien, kial li ne estos punata? Ŝi sentis, ke en la vivo ekzistas aferoj tre malfacile kompreneblaj.

Faladis la folioj. Kiam folioj falas, unu falas, la alia sekvas. Ili montras la vojon, kaj ŝajnas diri: « Venu! » iom plendante, kiam ili atingas la malvarman kaj nigran terajon; kaj la arbo restas su-

prestaranta kiel du maljunaj brakoj, kiuj atendas. La arbaroj similas al fumoj, kamparo estas griza kaj malseka kun nigraj kvadratoj abiaraj.

En la ĝardeno restis nur du aŭ tri brasikoj kun pendantaj velkintaj folioj; la aliaj estis jam fortrančitaj kaj konservitaj en angulo sub pajlo. Če la puto oni ne plu pumpadis. Pro falado de la folioj, vidiĝis denove la tegmentoj.

Poste komenciĝis la monato Decembro. Aline daŭrigis kudri. Ŝi kudradis de mateno ĝis vespero. Ŝi kudris čemizon, poste metis ĝin en la korbon; kaj ŝi prenis tuketon. Malrapide ŝvelis la tukamaso en la korbo. En ŝia vivo nenio alia okazadis.

Ŝi preskaŭ ne plu eliris, tial ke vidante ŝin oni sin returnis, kaj la knabegoj ridetis kaŝe. Iufoje tamen ŝi estis tiel malgaja, ke ŝi ne povas resti sidanta, kaj ŝi kuris eksteren. Ŝi iom paŝadis. La herbaĵo estis mallonga kaj flava kiel bestharegoj, kaj la arbetaĵoj similaj al ferfadenaĵoj. Ŝi marŝis klinante posten, ĉar ŝia ventro komencis fariĝi peza. Oni vidis, ke ŝi estas malgrasiĝinta. Kiam la vetero estis seka, ŝi sidiĝis sub arbo por ripozi momenton. Ŝi deziris plori, sed plu ne povis. Poste ŝi revenis. Kaj diris la patrino :

— Kial vi forkuras ankoraŭ? en via stato.

Kaj ŝi respondis nenion, ne plu rajtante diri ion. Ŝi havis nur la rajton fari tion, kio estas ordonita. Jen kion ŝi estus dezirinta fari: iri al la patrino kaj petegi pardonon; sin ĵeti teren antaŭ ŝi kaj meti la kapon sur ŝiajn genuojn, ke ĉio estu forgesita. Sed Henrikino restis nekomunikiĝema kaj malgaja, kaj Aline timis. Kaj dum oni eklumigis la lampon ŝi rekomencis kudradi.

Neniu kompatis ŝin. Kelkafoje vortoj helpas multe, kiel oleo sur brulumoj. Ŝi havis nur la silenton. Ĉiam doloris al ŝi la stomako. Flavaj makuloj estis ekaperintaj sur la nazo, kaj amara gustumo sur la lango. La vangoj similis malpuran paperon. Ŝi tiom maljuniĝis, ke preskaŭ nerekonebla ŝi estis. Kaj la egiĝo de ŝia ventro timigis ŝin.

Ĉirkaŭ fino de l'monato frostiĝis. Glaciaĵoj similaj al longaj blankaj barboj pendis ĉe la fontanoj. Sur la malmoliĝinta strato aŭdiĝis la bovinhufoj. Aline pli kaj pli tusadis, kuŝante en ĉambro senfajra. Poste venis la frostvundoj. Tiel dikaj kaj rigidaj fariĝis ŝiaj fingroj, ke ŝi preskaŭ plu ne povis ilin faldi; ofte ekkrevis la haŭto kaj sango elfluis. La kudrilo ŝajnis al ŝi tiom peza, kiom fertango. La kateto ludis kun ŝia fadenvolvaĵo.

Kiam alvenis Kristnasko, la sonorilegoj sono-

radis. Estas epoko por ĝojo kaj promesoj. Arbon oni starigas en la preĝejo, kaj la infanoj venas, kaj la virinoj ankaŭ venas por vidi. Komence estas malhele; oni kantas kaj eklumigas la kandelojn. Ili ŝajnas larmetoj moviĝantaj en la verda arbo meze de la pendigitaj oritaj nuksoj. La abio estas granda kaj preskaŭ atingas al plafono. Kaj ĉe la supra pinto troviĝas kandelo kun granda stelo, tial ke dum kristnaska nokto la paŝtistoj vidis stelon kaj sekvinte ĝin vidis la stalon, la manĝujon kaj la infanon Jezu. Sed Aline pensis, ke la bona Dio ŝin forlasis pro ŝia peko.

Poste dum Novjar-nokto je noktomezo ŝi pensis : « Kio ekokazos? » Kio povas okazi, kiam malfeliĉo ĉeestas? Du aŭ tri monatoj pasontaj, kaj jen la infaneto; kaj la sezonoj turniĝantaj kiel ronddanco sur la arboj. Antaŭ ŝi malfermiĝis la jaro : ĝi similas al longa vojo, nuda kaj rekta, sur kiu oni devas marŝi. Antaŭ si ĝis malproksime oni vidas nenion sur la vojo. Ŝi fermis la okulojn. Ĉu oni povas haltigi la tempon pasantan? Ĝi eĉ ne estas kiel aero pasanta, kiu sentiĝas pasante; la tempon oni ne sentas kaj ne vidas, sed nepre ĝi pasas. Kaj la etulo moviĝis en ŝi. Ŝi diris al si : « Tiel ekvenas la aferoj, ilin oni ne povas kontraŭstari. »

Longtempe daŭris malvarmo, ĉar la vintro estis akra. Simila al malfermita buŝo, la ĉielo blovis varman haladzegon, kiu moligis la stratojn, faligis la neĝon el tegmentoj kaj verdigis la herbon en herbejoj. Oni diris : « Malsaniĝas la vintro. » Kaj la infanoj kuradis antaŭ la domoj. De trans la montoj sin baldaŭ ekĵetis la martoventoj saltegantaj super la lago, kiun ili skuas. Poste, pezigitaj de akvo, ili ekfrapegis la nubojn per granda tuŝego, kiu trafendis ĉielon; kaj disĵetiĝis la ĉielo kun granda bruo. Tiam suno ekbrilis, kaj primoloj floradis.

Ekzistas je tiu epoko de l'jaro kvazaŭvoĉo, kiu kuraĝigas al vivo. Ĝi estas en la kantanta birdo, en la tago kaj en la ŝvelantaj burĝonoj. Printempo saltas unupiede tra la vojoj. Vidiĝas la maljunuloj, kiuj venas sur la sojlo, enspiras la aeron, kiel soifanto, kaj paŝadas en la ĝardeno rigardante al ĉielbluo. Tamen ankaŭ vidiĝis pli bone la bluaj makuloj ĉirkaŭ Alinaj okuloj kaj la du kavoj en ŝiaj vangoj.

La tago de la liberigo alproksimiĝis.

II

Dum monato Marto okazis la unua ekmaltrank-viliĝo. Henrikino pensis : « Se almenaŭ la infaneto ne venos antaŭtempe; ni havos ĉion samtempe. » Kaj ĉar ŝi estis zorgema, ŝi venigis la akuŝistinon.

La akuŝistino venis iun matenon, kaj ne frapinte ŝi eniris kaj diris :

— Bonan tagon, ĉu ne prosperas?

Ŝi havis vizaĝon nigretan kaj kvazaŭan liphar-aron. Ŝi tabakenflaris, poste ternis kaj denove en-flaris. Ĉe la nazpinto pendis ĉiam bruna guteto. Oni ne plu sciis, kiun aĝon ŝi havas. Kaj se, parol-ante pri iu, oni diris :

— Li sentaŭguliĝas.

Ŝi respondis :

— Tian knabegon mi neniam vidis.

Kaj se oni parolis pri iu alia :

— Li naskiĝis sen averto.

Nur tiumaniere ŝi rigardis la mondon. Ŝi konis ĉiuspecajn kuracilojn en sia metio kaj pro kutimo oftege viŝadis al si la manojn en sia antaŭtuko. Al la virinoj ŝi diris :

— Nu, kia strangaĵo! ĉiuj tion spertas, se nur ili volas.

Kaj pri ŝi oni diris :

— Malproksimen oni povus iri antaŭ ol trovi alian similan. Nenio kapablas ŝin emocii.

Resume, bone pagita kiel ŝi estis, kun donaco post ĉiu bapto, ŝi sukcesis ŝpari monon, kaj tio igis ŝin pli respektata.

Ŝi traekzamenis Aline kaj trovis ŝin sangmalriĉa kaj nervula, laŭ ŝia esprimmaniero; sed estas bone konata, ke la juna generacio ne egalvaloras la antaŭan; kaj nedezirindaj estis la cirkonstancoj. Ŝi rondiris ĉirkaŭ la lito, purigante al si la nazon per granda ruĝa poŝtuko, parolante multe, kaj ripetante :

— Jes, jes, la afero ne ankoraŭ urĝas.

— Tamen, diris ŝi, post tri semajnoj, eble jes.

Kaj okazis, kiel ŝi estis antaŭdirinta. Ekvenis Aprilo puŝanta antaŭ si nubetojn similajn al blankaj kokinoj en cejana kampo. Varmega estis la

tago. La malvolviĝintaj folioj streĉiĝis aeren per novaj fortoj; kaj tremmovo vidiĝis super la kamparo. Doloroj komencis en la posttagmezo; vespere, ili akriĝis. La akuŝistino diris:

— Nu? mi ne multe eraris.

Kaj ĉar Aline ĝemis:

— Filino mia, reparolis ŝi, kriu sengene, tio helpos al vi; kaj iom puŝu, kiam vi sentos ion.

Poste ŝi suprentiris siajn manikojn por esti preta, sed nenio urĝis. Henrikino metis sur la fajron la grandan kaldronon plenan je akvo. La brulŝtipoj kraketis; ŝi klopodis, kiel mastrino, kiu preparas la manĝon. Sed, kvankam ŝi tion kaŝis, ŝi estis sufiĉe emociita. Oni nepre ne devas perdi la kapon en tiaj momentoj. Kaj ŝi sin streĉis. Rozkolora estis la vaporo, kaj bolis la akvo.

La akuŝistino trinkis la kafon kaj manĝis panpecon kaj fromaĝon. Ŝi tranĉis la fromaĝon sur la tablo per la tranĉilpinto kaj enpikis ĝin per unu mano; pere de la alia ŝi mordis la panon; ŝi malplenigis la tason per etaj englutoj kaj denove plenigis ĝin, dirante:

— Mi, mi ŝatas kafon, tio plifortigas. Sed ĝi devas esti ŝargita kiel kartoĉo.

Kaj ambaŭ atendadis.

Pli akraj fariĝis la doloroj dum nokto. Aline komencis kriadi. Ŝi kriis intermite, malforte, poste pli laŭte, plialtigante kaj subite ĉesante; tiam ŝi plendadis; kaj rekomencis la krioj, longaj kaj poste akraj kiel ŝtonegpintoj; kaj refalis ŝia kapo posten, kiam ŝi estis malfortiĝanta; premiĝis ŝia gorĝo kaj reeksonis la krioj. La akuŝistino frotis al si la nazon.

— Jes, jes, diris ŝi denove.

Ree ŝi purigis al si la nazon, ĉar ŝi ĉiam agis tiel.

— Ne timu; mi zorgas, estas en bona vojo; oni kriadas, kompreneble, estas la nervoj.

Ŝi kutime volis fari ĉion sola, pro fiereco. Sed tiun ĉi fojon la afero estis serioza. Tiam ŝi diris :

— Eble kuracisto ne estus troa.

La kuracisto alvenis en sia malgranda veturilo. Lia granda blanka ĉevalo kutimis levi la krurojn alten, kiam trotanta. De malproksime aŭdiĝis la klara frapado de l'hufoj sur la strato, poste la ruliĝado de l'radoj; kaj li ekaperis. Li formetis sian manteleton kaj ĉapelon. Poste li lavis al si la manojn per varma akvo kaj sapo. Kaj kaŝinte sian ilarujon post la dorso, li eniris la ĉambron. Malfermita restis la pordo pro la iroj kaj reiroj. La

kateto, heligita de la fajro, dormis en la elrabotaĵoj kun kapo inter la piedoj.

Kiam ĉio estis finita, la lampoj paliĝis; tagiĝo griza kaj timema venas.

— Ha! diris la kuracisto, feliĉe infanoj ne ĉiam tiom klopodigas ekvenante en mondon. Oni plu ne volus ilin.

Kaj residiĝinte sur la veturilbenkon, li viptuŝetis la ĉevaleton, kiu ekiris kiel vento, ĉar li estis ĵus manĝinta avenon.

Malbonhumora tamen estis la akuŝistino. Ŝi diris :

— Nu, jen estas fanfaronulo. Mi estus farinta la aferon tiel bone, kiel li.

Sur la lito estis Aline kaj la ĵus naskita etulo. Oni lin envolvis en la vindotukojn. Ĝi estis knabo. Aline reendormiĝis. Ŝi estis blanka kiel la morto, kaj la okulharoj ĵetis ombron sur la vangojn.

Malorda estis la ĉambro. La lito estis tirita mezen de l'planko. Apude staris la sitelo, en kiu oni banis la infanon, kaj en angulo amaso da tukoj kaj viŝaĵoj. Sur la mebloj vestoj kuŝis dise.

Tamen avertita pro la kuracist-veturilo, la najbarinoj frapis ĉe la pordo unu post alia. Jam de longe ili ne estis revenintaj. Kiam oni faras, kion

Aline faris, la honestaj personoj restas hejme. Sed pli forta fariĝis la scivolemo. Kaj ili sin senkulpigis, dirante :

— Mi venis por ŝciiĝi, kiel fartas.

La akuŝistino respondis :

— Fartas bone.

— Des pli bone, mi revenos.

Kaj, kiam sur la strato, ili diris :

— Ĉe nasko de mia unua infano, multe pli facila estis la afero. Mi lasis ĝin veni, jen ĉio. Nu, Aline, ŝi estis punota, estis meritate. Ĉu oni bezonas kuraciston! Kaj la infano, ĝi ne devas esti multtaŭgulo, se li vivos.

Tiam ĉiuj aplaŭdis aprobe. Kaj agitiĝis la langoj kiel bovin-sonoriletoj, kiam la paŝtisto vipklakas.

III

Aline restis en lito dek kvin tagojn. Poste oni permesis al ŝi iri ĝis la granda apogseĝo apud la fenestro. Ŝi sidiĝis tie kaj strečis siajn rigidiĝintajn krurojn. Dum tiu tempo, kiu estis ripoztempo, ŝi estis kiel la malsanuloj, kiuj havas kvazaŭdormon en la tuta korpo kaj estas tiamaniere enfermitaj en sia malsano, ke ili vidas la vivon survišita kiel ĝardenon per nebulo. La pasantoj, nuboj, floroj kaj suno similas je aĵoj el alia mondo, kvazaŭ disigo okazis; kaj la tago preterfluas per movo unutona.

Poste, Aline vidis sian infanon en brakoj de la patrino. Tiam ŝi fariĝis senpacienca havi ĝin tute por si, alligiĝi je ĝi por ne esti forportita, kaj ankaŭ sin oferi, ĉar multajn klopodojn kostas infaneto; ili malpuriĝas, oni devas ilin luli, ilin nutri kaj zorgi pri multaj aliaj aferoj, kiujn ŝi dezirus mem fari, sed ŝi estis ankoraŭ tro malforta.

Ŝi rigardadis eksteren. Paseroj, falantaj are de

la tegmento, pasis antaŭ la vitraĵoj kiel nigraj ŝtonoj. Siringarbeto kovriĝis je verdaĵo, kaj ĝiaj folioj ankoraŭ ĉifitaj ŝajnis papilioj flugilbatantaj en la printempa aerblovo, sed nigra kaj malgaja estis la ĉambro kun siaj nudaj muroj, fumizitaj traboj kaj fermita fenestro. Henrikino pretendis, ke aero estas malbona por la novnaskitoj. Enspiriĝis la akra odoro de lakto.

La infano je tago de sia naskiĝo pezis nur kvar funtojn, kaj lia pezo preskaŭ ne pliiĝis. Li havis egan kapon, kiel ĉiuj infanoj, kiuj ĵus estas naskitaj, sed ankoraŭ pli egan kapon kaj etan korpon. Li estis nur iomo da karno. Lia vizaĝo similis al ruĝa bulo kun faldoj ĉe loko de buŝo kaj okuloj, kaj du truoj ĉe loko de nazo. Li tenadis siajn pugnojn prematajn kontraŭ la vangoj. Li ne havis harojn, nek brovojn, sed kvazaŭharojn sur frunto kaj ŝultroj.

Oni kuŝigis lin en tukaĵkorbon metitan sur du seĝoj. La fundo estis provizita per maizfolia matraco, kun tuketo, kaj super ĝi lankovrilo kaj lanuga kusenego, por ke li estu komforte varma. Sed tuj, kiam oni metis lin en tiun kuŝejon, li komencis krietadi. Tiel mallaŭtaj estis liaj krioj, ke oni devis alproksimiĝi por aŭdi, kaj ŝvelis lia vizaĝo

kaj malfermetiĝis la buŝeto montrante nudan dentokarnon.

Ĉiutage venis la akuŝistino alportante novaĵojn:

— Vi scias, ŝi diris al Henrikino, oni babiladas nur pri via filino. Estas vidindaĵo, vera bastono en formikejoŋ. Kaj oni rakontadas! ke la infaneto havas sur la vizaĝo vinmakulon tiel grandan, kiel mano, tial ke estis la patro drinkinta; kaj la cetero; ili havas serpentlangojn.

— Ha! diris Henrikino, lasu ilin babiladi.

Tamen iam post iam Aline reakiris fortojn. Ŝi povis denove stari, poste iom paŝadi. Unue ŝi marŝis ŝanceliĝe, ŝi sentis la pezon de sia kapo kiel pezan ŝtonon ŝin klinantan flanken, sed poste firmiĝis ŝiaj paŝoj. Ŝi prenis la etulon kontraŭ sin kaj miris, ke ŝi ne sentas lin, ĉar li estis tiel malpeza. Ŝi pensis: « Li pezas ne pli ol pajlero; necesas, ke li multe manĝu ». Granda feliĉo estus por ŝi estinta, mem nutri lin, sed ŝi ne havis lakton, ĉar ĉio estis al ŝi rifuzita. Kaj la infano nur malŝate sucis je botelo, laciĝante rapide tial, ke bovinlakto estis tro dika por lia delikata stomako. Aline diris:

— Trinku karuleto, trinku tuj, se vi volas fariĝi granda knabo.

Sed ne komprenas la infanetoj, kion oni diras.

Ili havas nur iom da forto por movi la membrojn, kaj en ilia kapo estas ankoraŭ malklare kiel en ĉambro kun fermitaj fenestrokovriloj. Eĉ amo helpas nenion. Tiel Aline lernis, kion lernas la patrinoj, kiam la tempo estas veninta. Ili ekfrapas sin kontraŭ tiun konfuzan viveton; kaj ili devas zorgi pri ĉio kaj diferencigi la kriojn, tiujn pro doloro kaj tiujn pro malsato kaj tiujn, kies signifon oni ne komprenas, kaj oni diras: « Estas pro malboneco. »

Ŝi metis la infanon sur tablon kaj malvolvis liajn vindotukojn. Montriĝis la nuda ventreto, ŝvelinta kaj blanka kiel ranventro, kaj la inerta kapo ruliĝis sur la kuseno. Aŭ ŝi banis lin; li estis tiel eta, ke lavvazo sufiĉis; la malvarmeta akvo fluis sur lia haŭto per brilaj buletoj similaj al roso.

Ankoraŭ mallertaj estis la manoj de Aline; jen ili premis tro forte kaj jen hezitis. Ŝajnas, kvazaŭ iometo povus rompi tiujn malfortajn membretojn.

Kelkafoje ŝi perdiĝis meze de tiuj zorgoj. Tiam foriĝis por ŝi la mondo. Restis nur infaneto sur tablo. Kelkafoje ŝi ridetis, kiel en tempo feliĉa. Ŝi kantis :

Dodo, infano,
Infan' ekdormos baldaŭ,
Dodo, infano
Por havi bonan kukon.

Sed ŝia rideto malfermiĝis nur penade, kiel ŝargo, kaj la voĉo refalis, kiel birdo en kaĝo, ĉar la infano ploris. Li estis tiel malfortika, ke oni kompatis.

Kaj revenis ŝia doloro. Kaj iun vesperon denove aŭdiĝis muziko en la vilaĝo. Aline sidis apud la lulilo. Ĉe la trinkejo oni dancis, kaj revenis ŝiaj rememoroj ĝis sub la granda pirarbo. Kaj alian fojon dum ŝi traserĉis en tirkesto, ekaperis la orelringoj, kiujn Julien donis al ŝi en la arbareto je komenco de l'somero. La kartona skatolo kun surpentritaj personetoj estis ankoraŭ envolvita en silkpapero. La koralgrajnoj similis al du gutoj el pala sango. Tio, kun la infano, estis ĉio, kio restis de ŝia amo. Ŝi diris al si : « Kaj li, kie li estas? Ha! li ne plu pensas pri mi. » Larmoj ekvenis en ŝiajn okulojn, kaj ŝi nazviŝis silente.

Ŝi sublevis sin tiel, baldaŭ rekaptita kaj retirita, kvazaŭ kateno malhelpus al ŝi forflugadon. Tamen ŝi enkuraĝigis sin per paroloj, kiujn ŝi ripetis funde de l'koro, redirante : « Mi devas ami lin, tiun etulon, multe ami lin por lin prosperigi kaj vivigi. Estas malagrabla tempo, sed deviga. Kiam li estos unujara, estos multe pli facila. Mi nepre devas ami lin, ĉar nur min li havas. Patrineto estas maljuna,

kaj je ŝia aĝo oni ne scias, kio povas okazi. Kaj li grandiĝos por la epoko, kiam ankaŭ mi estos maljuna. » Kaj ektremis ŝia karno dum kliniĝante sur lin.

Tamen la infano ne fartis pli bone, kontraŭe. Oni vidis lin estingiĝi kaj krispiĝi, kiel sekiĝanta frukto. Li preskaŭ plu ne povis moviĝi, flava fluidaĵo ŝvitis el liaj palpebroj kaj la haŭto estis skvameca. Aline rigardis la ombron, kiu sterniĝis sur lia arkigita frunto. Ŝi pensis : « Ĉu tio estas ebla, ĉu tio estas ebla! » Ŝi perceptis nevideblajn kaj malbonfarantajn fortojn ĉirkaŭ la infano. Ĉu ili volis forpreni lin? etuleton, kiu faris nenion malbonan, kaj ŝi pensis : « Tio sufokas lin. Kvazaŭestaĵoj sin kuŝigas sur lin. »

La akuŝistino estis bonkora kaj helpis al ŝi. Ankaŭ venis la kuracisto. Sed kion fari? kiam malsano estas tie ĉi, kion oni povas kontraŭ ĝi? Kuraciloj nur trompas la malsanon, oni uzas ilin por ilin uzi, kaj la doktoroj faras receptojn, sed ĉu oni scias, kien oni iras? Kuracistoj ne estas la pli fortaj. Vivo, kiu venis propramove, foriras malgraŭ ni, kiuj estas nemulto; oni tordas al si la manojn, kaj jen ĝi estas for. Kaj la etuloj, ne havantaj prudenton, ne povas sin defendi. Iun tagon

interpremiĝas la makzeloj, ili fariĝas tute verdaj, kaj oni diras : « Li estas mortinta. »

— Jen, diris la akuŝistino, por la aliaj estas nenio, sed kiam oni pensas, ke Julien estas kulpa je ĉio tio ĉi!

IV

Julien dume estis en bona sano kaj kontenta je vivo. Kiam li reaperis en la vilaĝo post la afero koncerne Alinen, oni lin akceptis, kvazaŭ nenio estus okazinta. Oni juĝis, ke li estas aginta prave. Fine tiuj aferoj ne koncernas la aliajn. Julien pagadis la trinkaĵojn ĉe la kafejo, kaj lia amikeco estis ŝatata. Kaj iam, dum kelkaj staris cirkle ĉirkaŭe, li fine parolis pri Aline; li diris :

— Vi scias, ŝi nepre ne volis lasi min, kiel hirudo; tiom amkaptita ŝi estis, vere.

La aliuloj admiris liajn harojn frizitajn, lian malaltan frunton kaj la dikan vejnon, ŝvelantan inter la brovoj, kiam li ekscitiĝis. Ili pensis : « Tiu ĉi almenaŭ havis virinon, kiu amis lin. »

— Jes, reparolis Julien, mi eĉ donacis al ŝi du orajn orelringojn. Ŝi ne redonis ilin al mi.

Li frapis per la pugno sur la tablon ridante. La verdeta sulfodoranta novvino saltetis en la glasoj.

Kaj meze de la silento aŭdiĝis maljunulo diranta ĉe tablo en fundo de ĉambro :

— Estas besto, kiu certe valoras ĉirkaŭ la ducentoj.

Tamen la gepatroj Damon estis maltrankvilaj pro la estonteco. Ili diris al si : « Kie oni haltas, kiam oni komencis? Ni devas edzigi lin. » Kaj ili serĉis edzinon por li. Ili estis devigataj multe klopodi. Ne ĉar mankas junulinoj, kiuj estus feliĉaj trovi edzon, sed maloftaj estas la taŭgulinoj, kaj necesas multaj kvalitoj. Fine tamen ili trovis iun konvenan en apuda vilaĝo. Tiu, kiun ili elektis, estis riĉa kaj sola filino. Kaj jam en komenco de majo Julien fianĉiĝis. Estis vespere. La akuŝistino enirante diris :

— Jen novaĵo kaj bela. Julien ĵus fianĉiĝis.

De sia ĉambro Aline aŭdis. Ŝi sentis kvazaŭan glacion, poste fajron. Kaj depost tiu momento ŝi ne plu sciis tre bone, kion ŝi faras.

Unue la etulo fartis ĉiam pli malbone. Li malvarmiĝis iom post iom. Kvankam oni hejtis tukojn, kaj metis ilin varmegaj sur la ventron, kaj kvankam oni ankaŭ kuŝigis botelojn de akvo bolanta ĉirkaŭ la liteto, la infano restis rigideta sub la tukoj; sole moviĝis la nevidantaj okuloj.

Ĉirkaŭ la dekunua Henrikino iris kuŝiĝi momenton, ĉar ili flegis unu post alia. Aline sin kubutapogis proksime al lulilo. Ŝi ne plu konsciis pri tio, kio ĉirkaŭas. Ŝi rigardis sian infanon kaj pensis : « Kian nomon mi donos al li, al tiu etulo? Henriko, pro Henrikino... aŭ eble... ne. Ĉiuokaze oni devos bapti lin antaŭ ol tri monatoj. » Sed ŝi tuj memoris : « Ha! estas vere, li estas tro malsana, oni devas atendi. »

Kaj ŝi pensis : « Li havas egan kapon kaj glu-itajn okulojn; sed tamen li havas malpli da haroj sur la vizaĝo. Tiuj haroj ekfalas rapide, baldaŭ oni ne plu vidos ilin. »

Tiam ŝi stariĝis kaj komencis paŝadi tra la ĉambro. Inter la lito kaj lulilo estis nur mallarĝa paŝejo. Ŝi marŝis ĝis la fenestro kaj revenis kaj rekomencis. Kvazaŭa mano tenis ŝin per la nuko kaj puŝis antaŭen. Ŝiaj paŝoj resonis en la brusto. Ŝajnis al ŝi, ke ŝi marŝis dum du tagoj.

Ŝi sidiĝis. Ŝi prenis la orelringojn el sia poŝo, turnis kaj returnis ilin en siaj fingroj kun mieno freneza. Ŝi pensis : « Tiuj orelringoj estas beletaj, se mi almenaŭ povus ilin surmeti, sed mi ne povas. Ili havas koralon ĉe finaĵo. Estas io bela, la koralo ».

Ŝi rekomencis paŝadi. Kaj repensante pri la

pasintajoj, ŝi unuafoje sentis koleron kaj vengêmon en sia koro. Ŝi diris al si : « Ili tro multe vundis min. Kompatinda etulo! Nur pro ili li estas tiel. Mi volas nenion por mi sed por li, kiam oni vidas lin en tia stato. Ha! Dio mia. » Krispiĝis ŝiaj fingroj kvazaŭ por ungoskrapi, kaj grincis la dentoj. Ŝi estus dezirinta mordi kaj ripetis : « Ili tro vundis min, ili tro vundis min. »

La planko kraketis sub la paŝoj. Henrikino ekfrapis kontraŭ la intermuro kaj diris :

— Kio okazas?

— Nenio, respondis ŝi.

Ŝi denove sidiĝis. La kandelo degutadis pro konsumiĝo. Ternis Henrikino; kaj poste aŭdiĝis plu nenio, ŝi estis reendormiĝinta.

Noktomezo jam sonoris. Subite Aline ekploregis. Akra plendkrio eliris el ŝia kapo : « Li estas fianĉiĝinta! fianĉiĝinta! Estas finite. Ha! kompatinda etulo, preferinde estus, se vi mortus. Kaj mi... »

La infano movetiĝis en sia lulilo. Siblanta kaj malofta estis lia spirado kun ŝirbruo. Aline rigardadis sian fileton per duonidiotaj okuloj. « Estas finite, ŝi pensis, li baldaŭ mortos, baldaŭ! » Sekaj restis ŝiaj palpebroj. Ŝi provis helpi la infanon; li vomis kvazaŭgalon verdan. Ŝi deturnis la kapon.

— Ho! ne, diris ŝi, ho! ne, mi ne volas.

Materiaĵoj dikaj kaj viskaj disfluis sur la brust-tuketon kaj restis tie algluiĝintaj. La elstreĉoj, kiujn li faris, tordis sian korpeton. Ŝajnis, kvazaŭ la vivo sin ŝirmas pli profunden post ĉiu ekskuo, por lin suferigi pli longe. Kaj Aline frostektremis.

Je tiu ĉi momento forto naskiĝis en ŝi kaj agis eĉ malgraŭ ŝia volo. Konvulsie agitiĝis la manoj. Tiam ŝi refaldis la kusenon sur la kapon de l'infano premante per tuta sia pezo. Aŭdiĝis brueto simila al murmuro de akvo en fontantubo; ŝi premis pli forte, aŭdiĝis plu nenio. Ŝi forprenis la kusenon; la infano havis malfermitajn buŝon kaj okulojn; sed la okuloj estis blankaj pro renversiĝo. Iom da sango estis elfluinta ĝis sub la mentono.

Ŝi viŝis la sangon per sia antaŭtuko kaj diris al si : « Li estas mortinta, li estas mortinta! » Kaj ŝi eksentis nenian doloron sed surprizon. Ŝi sublevis la kadavreton en siaj brakoj, kaj ĝin kuŝiginte sur la liton, sidiĝis apude kaj restis tie. Kaj subite ŝi revidis la kamelon, simieton kaj dresitan kaprinon; ĉio reekvivis en ŝi ĝis la plej malgrandaj detaloj. La homo havis ruĝan fulardon, la ĉielo estis griza; batiĝadis la tamburo, kaj elstreĉis la kamelo sian pintforman kapon. Kaj Julien aperis sur la placo;

li surportis veŝton kun manikoj el densa tolo, kaj lia ĉapelrubando havis agrafon ŝtalan. Ŝi parolis kun li, li respondis al ŝi; la simio svingis sian sabron, kaj knabino havanta tusspasmojn tusadis raŭke kaj senĉese.

Tamen disiĝis ŝiaj revoj per unu fojo, kiel nebulo per vento, kaj ŝi retrovis antaŭ si la kadavreton. La kandelo fumaĉis sur la tablo. Ŝi denove diris : « Li estas mortinta! li estas mortinta! » Kaj subite ŝi ekkriegis, malfermis la pordon kaj eliris kurante.

La luno, je sia malkreskanta kvaronaĵo, subiĝis post la arbetaroj. Restis nur la steloj kaj ilia cindra lumo falanta super la arboj. Pura estis la nokto. La malpeza aero preterpasis per blovaĵoj, kiuj starigis la herbon. Aline kuradis laŭhazarde tra la kamparo, trasaltante la riveretojn kaj falpaŝante la elstaraĵojn. Antaŭ ŝi konfuzaj formoj okupis la spacon. Post ŝi, sub la senmova ĉielo, la vilaĝdomoj, grupigitaj ĉirkaŭ la preĝejo, similis al endormiginta ŝafaro apud staranta paŝtisto.

V

Matene talpkaptisto trovis Aline. Li portis dorskorbon. Tiel malgranda kaj maldika li estis, ke liaj pantalonoj ŝajnis plenaj je vento. Lia barbo en vangokavo similis al la griza musko, kiu kreskas sur ŝtonegoj. La tutan tagon li iradis lamante, fiksante siajn kaptilojn de talpejo al talpejo. Li ricevis por la kaptitaj talpoj po kvar spesdekoj, kiujn li tuj trinkuzis en angulo de l'kafejo.

Aline estis sin pendigita per sia zono al la malsupraj branĉoj de pirarbo. Ĉar la piedoj tuŝis tere, ŝi estis devigata faldi la genuojn; kaj ŝi restis duone pendanta, dorse kontraŭ la trunko de l'arbo. La vento dolĉe lulis ŝin. De malproksime ŝi ŝajnis kiel ludanta knabino; sed de proksime vidiĝis la vizaĝo bluiĝinta kaj la okuloj vitriĝintaj.

Tiam la talpisto formetis sian dorskorbon kaj kuris al vilaĝo lamante ankoraŭ pli kaj parolante al si mem.

Jam leviĝinta estis la suno, kiam alvenis la vilaĝaj oficialuloj, la pacjuĝisto, la registristo kaj du aŭ tri aliaj homoj, kiuj sekvis. La juĝisto estis dika kun blanka barbaĵo. La skribisto estis altkreska kaj tute razita. Ili haltis ĉe la piedo de l'arbo. Oni malpendigis Alinen, ŝi estis malvarma. La brakoj pendis. La malligitaj harplektaĵoj falis ĝis lumboj, kaj la malglata ŝtofo de la zono estis en la haŭton prenetrinta.

La registristo skribis sur paperfolio, la juĝisto tenis la manojn post la dorso; la aliaj iom flanke parolis mallaŭte; kaj la talpisto diris :

— Jen kiel okazis : mi eliris el la randarbetaĵo tie, ĉar tie troviĝas kampoj tiom plenaj je musoj, ke mi havis okupon por la tuta mateno; kaj mi ekvidis nigraĵon, jupon, sed ne la kapon, kiu estis kaŝita, kaj mi pensis : « Estas strange. Jen ulino kiu leviĝis frue, sendube; kaj, kion ŝi faras? Kaj nu, kion? mi iris por vidi; kaj jen ĉio. »

Tute rozkolora estis la pomarbo, kiel fianĉinbukedo; ĉirkaŭe la ĉerizarboj jam perdis la florojn. La herbo odoris, kiel acida okzalo kaj dolĉeta minto. Verde pudrita estis la arbareto; aŭdiĝis la rivereto fluanta, kaj konfuza grincado elvenis el la arboj; estis la birdoj pepantaj. Kiam la regis-

tristo finis skribi, oni metis Alinen sur homportilon kaj fortransportis ŝin.

Tamen, ĉar Henrikino vokis meze de nokto, oni alkuris. Lanternoj kvazaŭ solaj kuris terproksime. Vidinda estis tiu anaro. Ili diris: « Kion vi havas? » Poste foriris la viroj, dum la virinoj restis. Ilin altiras malfeliĉaĵo, kiel sukero la muŝojn.

Ili kuŝigis Henrikinon en la apogseĝon, tien kie oni metis Aline; kaj ŝi senkonscie obeis. Oni donis al ŝi trinkaĵon, kaj ŝi trinkis. Sed, kiam oni alportis la korpon, ŝi subite ekstaris tute rekte kaj ekkriis:

— Estas taŭge! estas taŭge! ŝi tion ŝuldis!

Kaj falis sur la kaheloj.

Dum la mateno pleniĝis la butiko je popolo. Sur la bretoj troviĝis laŭliniigitaj vitropokaloj plenaj je kandosukero, je mintpecoj, je cinamo, kaj ladkestoj por konservi biskvitojn, kaj butonskatoloj. Traflosis ankaŭ malakra odoro, kun saleca gustumo, ĉar ŝinko kaj kolbasetoj pendis de lignaj najloj super la granda pesilo kun rustintaj ĉenetoj kaj kupraj teleroj. Kaj meze de siaj sakoj la butikistino pesinte sodon apogis sin sur la vendotablon kaj diris:

— Kia afero!

Tamen ĉiuj kune parolis la virinoj :

— Oni diras, ke antaŭ ol sin pendigi, ŝi sufokis la etulon.

— Ĉu oni iam scios?

— Tamen, li mortis.

— Car li estis tre malsana.

— Kaj poste?

— Sango elfluis el lia nazo.

— Kaj ŝi?

— Ha! ŝi, ŝia lango elpendis.

— Mi, mi jam pensis, ke tio finiĝos malbone.

— Tiu Aline, diris alia, ŝi havis aspekton tiel kvietan, ke oni povus kredi, ke ŝi dormas! Ĉu oni povis imagi? Fine, ĉio tio okazas pro Julien.

Kaj alia :

— La kuracisto diris : « Morto venis pafrapide al la patrino, sed al la etulo!... »

Kaj aldonis la butikistino :

— Dio mia! kiel abomene.

La suno, kiu jam de momento kaŝiĝis, eliris de post nubo, kaj la kafeja fasado subite heliĝis. Sur najbara sterko, koko kun malfermita beko kantis. (?) Koko-kriis.-

— Vidu, tiaj estas la karakteroj; kun tiuj akvoj senmovaj, oni devas miri pri nenio.

— Ho! jes.

— Kaj, ke ambaŭ estas kulpaj.

Tiam ili silentiĝis. Preterpasanta estis la juĝisto. Oni diris :

— Jen unu, kiu havas nefacilajn servutojn.

Kaj tuj poste rekomenciĝis la babiladoj. Kaj des pli pliiĝis la eksciteco, ke novaĵoj alvenis.

— Kaj Henrikino?

— Oni timas diri.

— Kion?

— Ŝi diris, ke estas meritite.

— Ne eble!

— Kaj ŝi ruliĝis teren. Nun, ŝi diras plu nenion.

— Kompreneble.

Tamen, ĉar la mateno preterpasis, foriris la virinoj unu post alia por meti la supon surfajren.

Oni faris tualeton de Aline, forprenis ŝian eluzitan malnovan veston kaj surmetis anstataŭe tiun, kiun ŝi portis ĉe la unua komuniiĝo. Iom mallongaj estis la manikoj, tro mallarĝa la talio, kaj vidiĝis la maleoloj el la jupo, sed ĝi estis ŝia plej bela robo, kaj oni devas esti konvene vestita por enteriĝi. Oni diris :

— Kiom malgrasa ŝi estas; estas kompatinde.

— Jes, ĉar ĉagreniĝo eluzas.

— Ŝi certe suferis multe, ĉu ne?

Unu al alia la virinoj fingromontris la nigran ringaĵon sur la kolo markitan de la ŝnuro. Kaj ili fiksis mentonumon ĉirkaŭ la kapo por reteni la malfermiĝantan makzelon. Kaj ili parolis mallaŭte pro Henrikino. Poste, lavinte la infanon, kaj vindinte ĝin en purajn tukojn, ili metis ĝin sur la liton apud ĝian patrinon. Kaj ili kuŝis tie, patrino kaj infano, kiel je tago de l'nasko.

Aline estis ankaŭ pala, kiel en tiu tago, sed la vizaĝo estis kvieta, la trajtoj malstreĉiĝis; nekredeble estis, ke ŝi tiom multe suferis; profunda paco etendiĝis; kaj ŝiaj oreloj estis brilglataj kiel vakso. Oni krucigis la manojn sur la brusto; vidiĝis la okuloj sub la duonfermitaj palpebroj. Lanuga kusenego kovris ŝian korpon ĝis la talio; la nigra korsaĵo kontrastis forte kun la blanka lito.

Ŝi ŝajnis tre longa, kaj la infano tute malgranda. Kiam ĉio estis preta, oni kovris al ambaŭ la vizaĝon per poŝtuko, por malhelpi al la muŝoj surflugi.

Ĉar vespero venis, la virinoj preparis sin noktogardi. Tri ili estis, por sin enkuraĝigi. Ili sidiĝis ĉirkaŭ la tablo. En la ĝardeno merloj sin post-

flugis kriante. Kaj la krepusko enŝoviĝis sub la pordon, kiel bruna katino; kaj ili diris :

— Oni ne restos tiel, sen lumigilo.

La du aliaj respondis :

— Certe, ke ne.

Ili rapidis serĉi la lampon, ĉar jam malluma estis la kuirejo, kaj ili iom timis; tamen ilin trankviligis la lumo. La lum-ŝirmilo el rozkolora papero lasis la ĉambron en mallumo; sole la tablo estis heligata. Kaj en la ombro malprecize distingiĝis la mallarĝa lito kaj formo sur la lito.

Post momento unu diris :

— Mi estas malvarma ĉe la piedoj.

— Ho! diris la dua, estas pro la sidado.

Kaj aldonis la tria :

— Surmetu almenaŭ ŝalon sur la ŝultrojn.

Henrikino ne estis moviĝinta el sia loko de post sia falo matene. Internen estis ŝiaj rigardoj fiksataj, ne moviĝis la manoj, kaj ŝi tenadis la kapon kliniĝe.

La virinoj ŝin observis kaj skuetis la kapon.

— Jen! ili diris.

— Jes, jen!

— Kia bato, ĉu ne?

— Ŝi estas kvazaŭ kapfrapita.

— Ho! jes.

Kaj ili parolis pri alio. Iam post iam ilin enpenetris la dormemo. Malvigliĝis iliaj pensoj, kiel branĉoj sub neĝo. Sed, tuj kiam fermiĝis la okuloj, ili sin remalfermis propramove. Ili malkvietiĝis sur la seĝoj. Okaze ili interŝanĝis rigardon. Ili sentis la morton flirtanta ĉirkaŭe; tial estis la aero kvazaŭ plidensigita.

Fine tamen endormiĝis unu post la alia. La lampo brulis kraketante, nenia alia bruo aŭdiĝis.

Kelkafoje ankaŭ, ekspiradis pli forte unu el la dormantinoj, kubutapogita sur la tablo, kaj frunton en siaj manoj; allogita de la flamo noktopapilio kvazaŭtuŝetis la lum-ŝirmilon; aŭ la vento blovis en la arboj.

Kaj la tagiĝo, eklevigînta sur la monteto, rebrilis malsupren en la fontanoj. Malfermiĝis la arbaretoj antaŭ ĝi, kaj frosttremis la herbo sub ĝiaj paŝoj. Flameto agitiĝis oriente, rozkoloraj bandeloroj flirtis ĉe pinto de l'abioj. Kaj nova espero, puŝanta la dompordojn, ridetis starante sur la sojlo, dum en la ĉambro la lampo elestingiĝis, kaj la virinoj ekvekiĝis.

Rapide disvastiĝis la famo pri morto de Aline. Eĉ ne pasinta estis la mateno, kaj jam oni alkuras de ĉie por sciiĝi.

— Ĉu estas vere?

— Jes, estas vere.

Ĉaroj staciis antaŭ la kafejo. Virinoj venis de fore, marŝantaj grandpaŝe kun ŝuoj blankigitaj de polvo, kaj ili eniris ĉe konatinon. Kaj ankaŭ oni komencis kompati Alinen, ĉar ŝi estis mortinta, kaj por mortintoj oni estas malpli senkompata; kaj fine, tio estis tro malfeliĉa; kaj oni diris :

— Ŝi mortis; kaj mortiĝi tiel!

— Tiel!

— Forpreni al si la vivon!

— Dio mia! Dio mia!

Tiam oni silentis momenton por imagi al si la pomujon, la ŝnuron kaj pendiĝintan Alineton.

Kaj oni diris ankaŭ :

— Ha! jes, tamen strange estas vivi. Jen, ĉu ne, oni komencas, kaj jen oni estas en la mezo, kaj jen finiĝas; kaj kiam estas finite, la afero staras, kvazaŭ oni ne estus komencinta. Kaj ankaŭ, ke ĉiu devas tion trapasi, ne vere?

VI

Kiam plennoktiĝis, oni alportis la ĉerkon. Ĝi estis farita el kvar tabuloj malbone rabotitaj kaj pentritaj nigre. La lignaĵisto laboris la tutan tagon en sia hela kaj sunlumigita butiko plena je rozkoloraj rabotrubaĵoj. Li martelis la najlojn fajfante. Ĉar li estis lerta, la laboro finiĝis antaŭ la vespero. Poste, li ekbruligis sian pipon kaj diris al si : « Estos baldaŭ tempo iri ĝis tie. »

Oni kuŝigis la ĉerkon apud la lito kaj enmetis Alinen kun la infaneto inter la brakoj. Ŝi ŝajnis, kvazaŭ ŝi dormas lulante lin, kaj li ankaŭ ŝajnis dormi. Oni kovris ilin per nova tuko, refaldis la kovrilon por konstati, ĉu ĝi bone funkcias; sed la infano okupis malmulte da loko, kaj facile fermiĝis la ĉerko; restis nur atendi la portistojn.

Dum la nokto fulmotondris; estis la unua fojo tiun ĉi jaron. Unue silento, poste bruo kvazaŭ ĉaro

ruliĝadas, bruego kaj verdaj fulmoj ĉe la fenestroj. Poste la nuboj ekkrevis kaj falegis en la branĉojn; kaj pliintertempiĝis la fulmoj, plimalfortiĝis la tondro; la pluvo fariĝis malpli densa, falante ĉie egale, kaj la defluiloj kantetis post la pluvego. Je mateno, la vento disigis la nubojn, kaj la ĉielo ŝajnis kvazaŭ ĝi malsupreniĝas sur la bluiĝintajn malsekajn vojojn.

Iom antaŭ la dekunua, horo de l'enterigo, la pastro preparis sin por la kulto. Li formetis la veston, kiun li surportas ĉe si kaj surmetis freŝan kolumon, nigran kravaton kaj redingoton; kaj ankaŭ sian silkĉapelon, sopirante, ĉar nenio estas tiel malfacila, kiel tiuj privataj mortaferoj; oni devas eviti ĉiuspecan aludon, tamen konsoli kaj promesi ĉielon, kiam ĉielo estas duba. Tial li ekiris spite si mem, kunportante sian ledflekseblan biblion kun orizita rando.

Plenumiĝis la kulto en ĉambro de Henrikino. Ne multaj ĉeestis, ĉar Aline ne estis laŭordinare mortiĝinta. Venis nur kelkaj najbarinoj kaj du viroj, kuzoj; kaj ĉiuj sidadis kontraŭ la muro. Meze de la ĉambro estis tablo kaj seĝo por la pastro.

Unue li diris preĝon, kaj ĉiuj leviĝis. Poste ili

residiĝis, kaj li legis eltirajon el la psalmoj. Estas dirite tie :

« La okulo de l'Eternulo estas sur tiuj, kiuj Lin timas; sur tiuj, kiuj esperas per Lia boneco savi sian animon de el morto kaj travivi la malsategon.

« Nia animo pretiĝas por la Eternulo. Li estas nia helpo kaj ŝildo, ĉar nia koro ĝojas en lin kaj ni nin konfidas al Lia sankta nomo.

« Estu Cia boneco sur nin, Eternulo! kiel ni pretiĝas je Ci. »

Laŭtiĝis la voĉo de l'pastro ĉe komenco de l'frazoj kaj refalis ĉe la fino. Poste li parolis pri tio, kion li estis leginta, montrante, ke Dio estas kompatema, kaj oni ne devas sin forlasi en doloron sed relevi la kapon, ĉar la tago por revido estas proksima. Fine li denove pregis.

En la apuda ĉambro pezaj paŝoj aŭdiĝis. Portistoj estis venantaj por la ĉerko. Bonhumoraj ili estis, ĉar ili trinkis glason en la kafejo pasante. Ili diris :

— Feliĉe ŝi ne estas peza; kelkaj havas kelkcenton da kilogramoj!

Kiam finiĝis la pregĝo, la viroj ekprenis siajn ĉapelojn. La virinoj en larmoj ĉirkaŭis Henrikinon. Kaj ne ploris Henrikino. Sed kiam la pastro al-

proksimiĝis, ŝi strečiĝis kiel risorto, kaj antaŭ ol oni povis malhelpi, ŝi malfermis la pordon kaj ekvidis la nigran ĉerkon kaj la virojn; tiam levinte la brakojn, ŝi sin ĵetis kontraŭ ili. Oni devis ŝin perforti. Neniam estus oni kredinta, ke maljunulino havas tiom da forto. Kaj ĉar oni ŝin ne ellasis, ŝi komencis krii.

La ĉerko foriris sekvante la vojon, kiu kondukas al mortintejo, tra la vilaĝo. Eliris la popolo antaŭ la domoj por vidi. La ĉaristo, kiu marteladis ferpecon apud la flavleda blovilego kaj la hela fajro, strečis la kapon kaj metis la manojn surkokse; la lernoknabo ellasis la ŝnuron, kiu refalis, kaj la fajro refariĝis malhela. Knabeto tiranta radet-ĉevalon haltis, fingron en la buŝo. Fumego eliris el la komunuma bakejo. Poste, kiam estis la malgranda sekvantaro preterpasinta, reiris la popolo hejmen, la lernoknabo retiradis la ŝnuron, la ĉaristo reprenis sian martelon, kaj la amboso denove resonis en sunlumo. Fumadis la komunuma bakejo.

Tuj kiam ekster la vilaĝo, la vojo fariĝas kruta. Jam sekiĝintaj estis la marĉaĵetoj kaj defluiloj. Adianto montriĝis en nigraj tufoj tra la murfendoj. Oni antaŭeniris pli malrapide. Unu fojon haltis la portistoj por viŝi al si la frunton. Kaj oni reekiris.

La mortintejo kuŝis sur monteto. Grandaj arboj staris ĉe la enirejo. Oni alproksimiĝis, reenkuraĝiĝis la portistoj. La rustinta kradpordo grincis. Unue eniris la ĉerko, sekvis la du parencoj; kaj en angulo vidiĝis alta herbo, malkovrita kavo kaj apude la fosisto kun sia ŝovelilo.

Tamen Henrikino ne ĉesis kriadi. Ĉio, kion oni provis, neniel helpis; la virinoj diris :

— Oni devus ŝin ligi, oni ne povas lasi ŝin tiel.

La aliaj respondis :

— Sed, se oni ligas ŝin, ŝi freneziĝos. Pli bone estas atendi, ĝis kvietiĝos de si mem.

Kaj ili reparolis :

— Jam duafoje tio okazas; nun ŝi havas kvazaŭ nervatakojn.

daj arboj
eenkuraĝ-
o grincis.
oj; kaj en
kavo kaj
, kion oni
si šin tiel.
Pli bone
as kvazaŭ

TRIA PARTO

I

Je vespero tamen Henrikino kvietiĝis. Alvenas momento, kiam la fortoj estas elĉerpitaj; doloro restas, sed kaŝita kiel fajro, kiu reenŝoviĝas sub la cindrojn. Tiam foriris la virinoj.

Oni plu ne vidis ŝin dum du aŭ tri tagoj. Iun posttagmezon ŝi reaperis. Ŝi estis vestita kiel kutime, sed ŝia jupo estis ĉifita, kvazaŭ ŝi sin ne estus senvestigita depost la tago de l'enterigo. La punto de ŝia nigra ĉapo pendis sur orelon, la jupo estis blanka ĉe genuo, kaj la korsaĵo je violkoloraj floretoj eniĝis en la zonon. Ŝi trinkis je la fontantubo, kaj relevis butonon perditan sur la strato. Ŝi salutis neniun; kelkafoje ŝi skuis la kapon kaj svingis antaŭ si la manojn. Oni pensis: « Ŝi frenezigas. »

Ŝi ne estis freneza, sed nur forlasita. Kiam oni estas utila al nenio, oni ne scias kion fari, nek kien iri. Ŝi estis tute sola. Se ŝi mortus, oni eĉ ne atentus.

Kaj oni diris :

— Ŝi almenaŭ rekuniĝus kun sia filino. Je kio utilas al ŝi resti tie ĉi?

Oni respondis :

— Vidu, kiuj plu nenion havas por fari, tiuj plej forte alkroĉiĝas por ne foriri.

Ŝi estis kvazaŭ maljuna vinberujo, kiu ne plu portas fruktojn, kaj kies folioj falis, sed kiu ankoraŭ firme teniĝas je la muro kaj kontraŭstaras al vento.

Kaj la tagoj naskis semajnojn, kaj la semajnoj monatojn. Ŝi iradis en la vilaĝo, enirante en la panbakejon por aĉeti panon kaj en la butikon kafon; la virinoj sekvis ŝin per la rigardo, scivoleme, kaj la infanoj timis ŝin pro ŝiaj enprofundiĝintaj okuloj. Vidiĝis nur du nigraj kavoj sub la dikaj brovoj. Kaj refaldiĝis ŝia haŭto sur la ostoj.

Matene ŝi vizitis la tombejon. Ĝi estas loko, kiu ŝajnas ridi, plena je birdoj, floroj kaj ombro. Ĝin ĉirkaŭas muro, kiu disfalas ŝtonon post ŝtono meze de la urtikoj sovaĝaj kaj papavoj. Taksusoj kaj plorsalikoj ombras la tombojn kun nomoj elvišitaj; la

vitrokronoj, pendigitaj je lignokrucoj, tintas, kiam vento blovas. Troviĝas ankaŭ forgesitaj tomboj plenaj je musko kaj vinkoj. En la branĉoj nestas silvioj, sovaĝaj paruoj kaj kardeloj verdaj aŭ grizaj kun iom da ruĝo. Kaj en la altaj herboj malfermiĝas lekantoj, onobriko, salvio, trifolio, kampfloroj tie semitaj de la brizo.

Henrikino venis, portante laŭ la tagoj branĉplantaĵojn aŭ grajnojn, fosilon aŭ plantilon. Aline ĉiam havis florojn. Ŝia tombeto estis kiel ĝardeno. Tiel multaj estis la floroj, ke la tero ne travidiĝis. Kaj tuj kiam unu velkis, ĝin anstataŭigis Henrikino. Troviĝis skarlataj geranioj, violoj dolĉaj kiel vizaĝetoj, miozotoj kaj violetoj; unue ekaperis la violetoj, poste la miozotoj, kiuj ŝatas akvon kaj fontanojn, kaj poste la aliaj, ĉiu je sia vico.

Kiam ŝi estas fininta, Henrikino sidiĝis en la herbo apud la tombo, kun brakoj ĉirkaŭ la genuoj. De la loko kie ŝi sidis, vidiĝas la lago kaj la Savoja montaro. La ĉirkaŭlando kun herbejoj, kampoj kaj arbaretoj, malsupreniĝas ondsimile al la glataj kaj nuancitaj akvoj, en kiuj la ĉielaj nuboj posttrenas siajn grizajn ombrojn, kiel grandajn retojn. La monto estis blua pro malproksimeco. Okaze ĝi elblovis fumeton, kiel sekiĝanta lesivaĵo; kaj la

fumeto fariĝis ronda nubo, kiu forflugis. Vaporŝipoj alproksimiĝantaj al la lagbordo ŝajnis nigraj punktoj. Sur la strato neniu trapasis; ankaŭ neniu en la tombejo; tie estis nur la birdoj, herbo, kaj arboj kaj floroj; kaj mortintoj.

Henrikino ne moviĝis. Tiam alvenis birdoj, saltetantaj ĉirkaŭe, ĉar ŝi estis simila al la trunko de l'arboj aŭ al la tombŝtonoj. Ankaŭ la suno montriĝis kaj suprenigis laŭlonge de ŝia korpo. Tagmezo sonoris. Ŝi ekstaris.

La ŝlosilo grincis en la rustinta seruro. Ŝanceliĝa kaj malgaja estiĝis la domo, ĉar domoj similas al personoj. Sentiĝis, ke malfeliĉo eniris kaj metiĝis tie kvazaŭ kubutapogita kun sia malbona aspekto, kiu pezigas. Egaj araneoj trakuris en la koridoro. Kaj ankaŭ la ĝardeno estis forlasita. La legomoj supermaturiĝis, la pomarbo manĝita de vermaro perdis siajn pomojn antaŭ maturiĝo; la talpoj traboris truojn, la ranoj saltis sub la folioj.

Kaj la viroj, revenante de la kampoj, diris :

— Kia malpuraĵo, tiu ĝardeno!

— Rapide kreskas la herbaĉo.

Kaj tria :

— Kiel domaĝe, ke ĉio tio estas perdita teraĵo. Se almenaŭ oni donacus ĝin!

Henrikino trinkis sian kafon. Ŝi manĝis sian panon. Kaj ŝi vivadis. Ĉu la sango ne supreniras malgraŭe al koro kaj denove malsupren, kiam la cetero estas preskaŭ mortinta? Oni vivas sur si mem kaj sin rigardas kaj sin vidas, kiel brulinta arbetaĵo en nigran akvon; kaj oni returnigas posten, ĉar antaŭen ĉio estas fermita. Henrikino eniris en ĉambron de Aline. La lito kaj apogseĝo staris en sama loko. Sur la muro ankoraŭ pendis fotografaĵo. Ŝi prenis ĝin per ambaŭ manoj.

Sur ĝi vidiĝis Aline tute eta, kun blanka vesto kaj skulptita seĝo pli alta ol ŝi; kaj en la fundo, pentrita kastelo, foliaroj; kaj antaŭe, tapiŝo; sur tiu fotografaĵo estis kiel ĉe la riĉuloj. Aline havis frizitajn harojn kaj grandajn okulojn; la infantempo estas la bela epoko, kiam oni scias nenion pri la vivo.

Ili estis irintaj tute supren en domo, en vitran ĉambron. Estis varmege tiun tagon. Kaj ĉar Aline ploretis, la fotografisto montris al ŝi fadenpupon kun pintforma ĉapo kaj orumitaj tintiloj. Ili revenis hejmen per la vagonaro. Estis Henrikino perdinta sian edzon, la antaŭan jaron. Li mortis pro troa drinkado.

Ŝi remetis la fotografaĵon en sian lokon. Ombron

sur la straton faris la domo. La leteristo pasis, malfermante sian ledsakon, por serĉi leterojn. Bovinoj ĵus melkitaj iris trinki ĉe la fontano. Kaj homo kun fera dorskesto revenis de la laktejo.

* * *

Je aŭtuno Julien edziĝis. Oni estis atendinta ĝis fino de la rikoltoj, ĉar en tiu sezono oni havas tro da laboro por ekorganizi geedzan hejmon. Ankaŭ pro la morto de Aline estis la tempo nekonvena. La gepatroj Damon diris kiel la aliaj :

— Estas bedaŭrinde!

Sekrete ili pensis : « Nun, oni estas liberigita, nepre. » Tamen oni babiladis pri ili, kaj ne favore en tiu ĉi momento. Tiam Julien foriris dum du aŭ tri tagoj ĉe sia fianĉino. Poste li revenis. Kaj forgesiĝis la afero.

Belega estis la geedziĝo. La fianĉino alvenis je la antaŭa tago kun sia robo, vualo kaj delikataj ŝuoj en granda kartonskatolo. Ŝi estis larĝa kaj altkreska. La haroj estis trinuancaj, tial ĉar ŝi eliris nudkape ĉe suno. Julien atendis ŝin antaŭ la pordo. Kaj kiam ŝi saltis el la ĉaro, la jupo relevigante malkovris fortajn tibikarnojn kaj grandajn piedojn.

La morgaŭan tagon matene aperis la invititoj. La virinoj estis surmetintaj robojn el nigra lano, la viroj vestojn el drapo, kaj la urbanoj redingotojn. Unue oni alportis por manĝi kaj trinki : teon kaj siropon por la virinoj; trispecajn vinojn; malvarman viandon, ŝinkon kaj salaton; vaflojn kaj pastkukojn. La du teretaĝaj ĉambroj estis plenegaj. Kaj la virinoj ridis, ĉar vino ridemigis, kaj ĉe edziĝoj oni devas amuziĝi.

La gepatroj Damon estis tre feliĉaj. Damon la patrino ŝvitis en sia silkkorsaĵo tro mallarĝa; oleita ŝajnis ŝia vizaĝo; kaj ŝi parolis senhalte. Je ĉiu momento Damon la patro malsupreniris en la kelon kaj revenis ŝarĝita per boteloj, kiujn li malŝtopis inter la genuoj. Kaj, meze de la edzamikoj kaj iliaj honorfraŭlinoj, Julien estis iom ĝenata de sia nova vesto kaj kolumo.

Post la manĝo oni ekiris al preĝejo. Observis la sonorigisto tra la tegmentfenestro; la sonoriloj svingiĝis; ekaŭdiĝis la harmoniumo; kaj ĉe eniro de la geedzoj la junaj vilaĝaninoj kantis himnon.

La veturiloj sin envicigis antaŭ la pordego. Ili estis tri. Ili havis longajn benkojn kaj kurtenojn el forta tolo. La radoj freŝe relakitaj brilis kiel flamoj. La veturigistoj havis ŝnurvipojn kun bluaj,

malv- kaj rozkoloraj rubandoj, kaj blankajn fadengantojn; la ĉevaloj silkpaperajn florojn ĉe la okulĝirmiloj.

Kaj kiam eliris la sekvantaro, ekpafiĝis la bombkanonoj, ŝargitaj ĝis buŝo per herbbuloj malgraŭ danĝero. La pafistoj estis knabegoj el la Junulara Societo, kaj al ili oni pagis trinkaĵojn. Densa je popolo estis la placo. La ĉevaloj baŭmis, la virinoj ŝtopis al si la orelojn; kelkaj portis infanojn surbrake. Kaj pafiĝadis la bombkanonoj.

Tamen la invititoj eniĝis en la veturilojn, kiuj fortrotis. Julien kaj lia edzino troviĝis en la unua. Kiam Henrikino vidis ĝin venanta, kaj ekvidis poste Julien kaj la blankan vualon de la novedzino, ŝi stariĝis el antaŭ la pordo, kie ŝi sidis, kaj antaŭenstreĉis la pugnon minace. Sed jam estis la veturilo preterpasinta. La aliaj sekvis kaj refalis ŝia brako. Ŝi restis tie kun pendantaj manoj. La bruo de l'tintiloj, de l'radoj kaj de l'voĉoj malfortiĝis, kaj subite ĉesis post la stratturniĝo; kaj vidiĝis plu nenio alia ol griza polvetaĵo, kiu malrapide sterniĝis sur la malaltan herbon de la deklivoj.

FINO